

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Decembro 1948

36-a jaro N-ro 12

ORGAN FOR SVENSKA ESPERANTO-FORBUNDET

## LA LUMA KAJ MALLUMA DECEMBRO



La neesprimebla sento vibrigas la koron de la nordlandando, kiam la kristnaska festo proksimiĝas. Ĝi estas la plej granda festo de la jaro, la plej familia. Kaj en la malluma sezono oni provas eklumigi tiom da lampoj kaj kandeloj, kiom oni nur povas. En la plej malluma parto de la jaro oni festas lumfeston. Estas kutimo, en la hejmoj starigi piceon, kiun oni ornamas per diversaj multkoloraj aĵoj, sed precipe per kandeloj.

La kutimo kondukis al tio, ke oni ankaŭ ekstere starigas grandan piceon, kiun oni ornamas per inkandeskaj lampoj. En la urboj kaj vilaĝoj oni ie kaj tie en la placoj aŭ ĉefaj stratkruciĝoj aŭ en aliaj lokoj, kie estas konvene, starigas tiajn festajn arbojn. Kontraŭ la fono de la grize nigra ĉielo ĝi alten leviĝas, kaj je la ekvido de la verŝa lumo la homoj pensas: "Vere, do denove estas kristfestoj!"

### Kristfesta donaco

Kvazaŭ kristfesta donaco venis al la esperantistaro de la sveda radio la informo, ke oni havos ĉiusemajne esperantan dissendon ek de la komenciĝa de la nova jaro. Longe tiu staris sur la "dezira listo" de la svedaj esperantistoj. Nun finfine ankaŭ la sveda radio komprenas, ke ne utilas kontraŭstari la venkantan esperantan movadon.

La programoj enhavas aktualajn sciigojn pri svedaj cirkonstancoj kaj pritraktos ankaŭ esperantajn aferojn en Svedujo. Programgvidanto estos la rektoro de la Esperantoinstituto, s-ro Karl Söderberg el Uppsala.

La unua sendo okazos la 3-an de januaro 1949 je 08h15—08h30. Sendoj okazos ĉiulunde la menciitan horon kaj krome samtage 16.15—16.30 kaj marde 02.15—02.30. Ondolongoj 49,46 m, 31,46 m, 19,80 m, 27,83 m.


  
**SVENSKA**  
**ESPERANTO-TIDNINGEN**  
**LA ESPERO**

Decembro

1948

## BONAN KRISTFESTON

kaj

## BONAN NOVAN JARON

ni deziras al ĉiuj niaj amikoj kaj favorantoj.

Administracio kaj  
redakcio de  
L A E S P E R O

## Nylén donis sian arkivon al SEF

Jam antaŭe s-ro Nylén transdonis proksimume la duonon de sia arkivo al SEF kaj nun la duan parton de la arkivo estas en la samaj manoj. Kompreneble tia arkivo estas por SEF tre valora, kaj la donaco estas multe ŝatata. En tiu arkivo resp. guliĝas la fruaj tagoj de la esperanta movado, kaj iom post iom ja el tiu kolekto devas kreski ia esperanta muzeo, sed pri la formo de tiu ja estas nun tro frue paroli.

## Skolta tendaro en Bournemouth

Laŭ informo en La Skolta Mondo estos eble starigi skoltan tendaron dum la 34-a Universala Kongreso. La Skolta Asocio de Britujo anoncis sian aprobon de tia aranĝo. Tiu, kiu intencas partopreni, skribu al la Ĝenerala Sekretario, sed ĉu de Skolta Ligo, ĉu de la kongreso, oni ne informas. Provu ĉe s-ro F. N. Blythe, 103 Leopold Road, Ipswich, Suffolk, Anglujo.

## Desegnisto en Brazilio

La por la esperantistoj konata karikaturisto s-ro Dragutin Wranka el Jugoslavio faris vojaĝon al Ĉilio. Preterpase li vizitis Brazilion, kie oni lin kaj lian edzinon akceptis kun granda ĝojo. La gazeto Rio Esperantista trovis la okazajn tiel gravajn, ke oni publikigis foton pri ges-roj Wranka kaj alia esperantista paro ĉe la Krista statueto sur la monteto Corcovado.

### Paul Nylén ber enträget:

Finns någon esperantist, som har och vill skänka bort **Dagens Nyheter för tisdagen den 7 aug. 1934**, är han oerhört tacksam. I arkivet saknas nämligen detta nummer av nämnda tidnings esperantoreportage från Stockholmskongressen 1934.

Red. Paul Nylén, Huddinge.

Verkinto en ensendita al Ny Tid artikolo proponas, ke la porpacan premion de Nobel oni donu al la esperanta movado. Mankas aliaj konvenaj kandidatoj, sed la esperanta movado estas inda.

### Godtemplare — esperantister!

Undertecknad önskar komma i kontakt med alla esperantister i Sverige, som är medlemmar av IOGT eller annan nykterhetsorganisation. Gillis Staberg, Övre Djupedalsgatan 11, Göteborg. Tel. 12 33 99.

## Nuni Nanev kantas antaŭ plena salono

S-ro Nuni Nanev, la tra la tuta kontinento bonkonata kantisto de la opero de Sofio, estas bona esperantisto, kaj per sia distinga kantarto li plenumas gravan rolon en la propagando por nia lingvo. La partoprenintoj de la esperantokongreso en Malmö sendube memoras lian plaĉan dolĉan voĉon.

La 17-an de septembro Nanev prezentis antaŭ tutplena salono en la HSB-ejo en Stockholm koncerton tute en esperanto. En zorge farita elekto de arioj, kantoj kaj popolkantoj la bulgara kantstelo montris plej alt-rangan voĉon kaj muzikan arton. La plej distinga signo de lia voĉo estas la spir-delikata sed ĉiam sonora piano-pianismo kaj la bela sonkoloro en la meza kaj alta registroj. Kantoj de Caccini, Mozart, Schubert kaj Ĉajkovskij estis pura travivaĵo, kaj precipe en la sonkrakonto el "Manon" de Massenet nia bonkantanta esperantoamiko montris senpenan spirteknikon kaj efikan mezo-voĉon, kian ni malofte aŭdis. La dua parto de la programo estis rezervita por la popolkantoj, el kiuj la rusa "Sonorilo" ensorĉis la publikon.

Oni devas konfesi, ke esperanto bonege taŭgas por kantado, kaj ĝi posedas la saman esperimeblecon kiel iu ajn nacia lingvo.

Po la ovacia adlamo de la publiko la simpatia sudlandano surprizis la aŭskultantaron per kantado de "Sverige" de Stenhammar svedlingve.

Nanev estis brile akompanita sur fortepiano de sia bela, blonda edzino, sinjorino Ingeborg. Cetere estas ŝi, kiu plej lerte regas la esperantan lingvon en la Nanev-a familio, kaj kiel pruvon oni povas mencii, ke ŝi tradukis ĉiujn italajn, rusajn, bulgarajn, hispanajn kaj alilingvajn kantojn, kiujn kantas ŝia edzo.

En intervjuo s-ro Nanev deklaris sin preta doni koncertojn ankaŭ aliloke en la lando. Pridemandoj povas esti direktataj al SEF aŭ al la Stockholma klubo.

Carrfors.



Ges-roj Nanev el Bulgarujo.

### "Esperanto-Press" kaj UNO.

Laŭ oficiala informo, nia ĉefredaktoro estas akceptita kiel reprezentanto de "Esperanto-Press" ĉe la Eŭropa Oficejo de la Unuigitaj Nacioj (UNO) en Genevo. Esperanta entrepreno estas do, por la unua fojo, rajtigita, havi specialan korespondanton ĉe la grandaj internaciaj konferencoj.

(Esperanto-Press.)

Informoj pri Intersteno, la internacia stenografio kaj Parolspuro, la unua skribo tutmonda, eĉ por infanoj, de F. von Kunowski, estas havigeblaj ĉe

Hilding Svensson, Hemfridsv. 10, Norrviken, Svedujo. B. v. ald. resp. afrankon.

## Bona propagando por Esperanto

La tri Esperanto-Gracioj de Parizo, Monique Trolle, Renée Cullerre kaj Madelaine van Haezebrouck, kies belaspektajn trajtojn ni povas vidi en la sept.-okt.-numero de tiu ĉi gazeto, pago 112, kaj kiuj partoprenis en la esperantokongreso en Malmö kaj tie ĉarmis la kongresanojn per sia dancado, kantado kaj muzikado kaj poste faris sian triumfiron en kelkaj de la popolparkoj en nia lando kaj ankaŭ faris plurajn prezentaĵojn en Danujo, i. a. en la Kopenhaga televido, kantis en la sveda radio mardvespere la 9-an de novembro. Bedaŭrinde ili prezentis nur du kantojn en esperanto — la ceteraj estis en la franca lingvo.

La gazeto "Stockholms-Tidningen" enhavis la 17-an de septembro interesan intervjuon kun niaj famaj kaj kantemaj francinoj-esperanto-amikinoj. La 15-an en la sama monato la Stockholma klubo havis la ĝojon pli proksime interkonatiĝi kun la tri stelinoj, de kiuj du nekredible estas juro-studentoj.

En marto 1949 ili revenos al Svedujo kaj tiam havos intencon prezenti koncertojn kelkloke en nia lando, i. a. en Stockholm.

## Kursarangoj

Esperantokurso por komencantoj kun proks. 20 partoprenantoj estas en la popollernejo de Klara sub la gvido de nia multjara esperanto-instruisto, redaktoro Tiberiu Morariu.

Morariu ankaŭ gvidas kurson por komencantoj el la tramistoj en Sundbyberg. La partoprenantoj estas 12. Daŭriga kurso kun 15 kursanoj sub gvido de inĝeniero F. Svensson estas en la popollernejo de Klara.

La planita esperantokurso por la oficistoj en Stockholm, komenciĝanta (!) en novembro, kredible prokrastiĝos al februaro 1949. Instruisto en tiu ĉi kurso estos Roland Dupuis, kaj la ejo estos Kungsholmens Komunala Flickskola en Rålambshov.

Helge Carrfors.

## Korespondaj rondoj en IOGT

IOGT starigis en la tuta mondo "amikec-rondojn" por internacia korespondado inter bontemplanoj. El Nederlando kaj Svislando oni jam anoncis, ke la rondoj korespondas ankaŭ en Esperanto.

En Svedlando la unua rondo fondiĝis en la loĝio "De Förenade" (La Unuigitaj) en Gotenburgo. Tiu rondo korespondas germane, angle, france, kaj esperante, kaj aranĝos la unuan internacian letervesperon en decembro. Poste regule okazos tiaj letervesperoj ĉiun duan monaton. Abstinenculoj kaj simpatiantoj skribu al "Logen n:o 6 De Förenade", Norra Allégatan 3, Göteborg, Svedlando.

## Okcidentsveda distrikto

Dimanĉe la 21-an de novembro la klubo Verda Rondo kaj la distrikta estraro kunvokis por kunveno en Borås en la ejo de KFUM. Sur la programo inter alie estis traktado pri la eventuala starigo de nova distrikto de SEF. Tiun proponon prezentis s-ro Lennart Åberg el Skövde. La propono antaŭvidas kunfandiĝon de la nunaj Skaraborga kaj Gotenburgo-Ålvsborga distrikto de SEF kun aldono de Bohuslän kaj Halland. La distrikto laŭ la propono de s-ro Åberg havu kiel unuajn taskojn aranĝi konferencon en ĉiu aŭtuno, jarkunvenon en februaro kaj ian printempan aŭ someran kurson aŭ similan. Cetere la plej necesa tasko estus aranĝi kursojn en la distrikto kaj starigi novajn klubojn. La estrara sidejo prefere estu Göteborg.

Oni dum kelka tempo diskutis la proponon, kaj principe ĝin akceptis. Oni elektis provizoran estraron, kiu

## Verda Rondo 15-jara

Okazis en Borås dimanĉe la 21-an de novembro duobla kunveno: tiu de la distrikto kaj tiu de Verda Rondo. Kiu estis kiu, ne ĉiam estis facile diri, sed eble la unua kaj lasta partoj de la kunveno povas esti kalkulataj por Verda Rondo. En la mateno la esperantistoj iris al la tomo de la fondinto de Verda Rondo, s-ro Friberg, kaj metis sur la tombon florojn. Tie parolis s-ro Elg.

Meze de la tago estis pritraktoj distriktaĵaj. Al la kunveno venis salutoj de Oscar Juhlin, Hamburgssund, kaj de Oskar Sandkvist, Kinnared. Tiu lasta saluto prenis la formon de dekkrona monbileto por kovri parton de la kostoj por la arango, kaj certe tiu saluto estis bonvena. La prez. de SEF sendis telegraman saluton.

Poste la festan parton enkondukis s-ro Stenström per prelego pri la malfacilaĵoj, kiujn renkontas eksterlandano, kiu deziras lerni la svedan lingvon. Li elokvente montris la multajn danĝerajn rifojn en akcentado kaj ortografio, pri homonimoj kaj sinonimoj, elparolo ktp. Entute tio estis amuza kaj instrua prelego.

Kantis s-ro Myrén "Land, du välsignade", "Sten Sture" kaj "Junker Nils sjunger till lita" je la akompano de f-ino Warren. Tiu punkto estis la sola neesperanta en la programo, en kiu oni cetere enkondukis esperanton en la esperantomovadon.

Ĉe la kaftablo s-ro Elg donis la historion de la klubo kaj nomis tiujn esperantistojn, kiuj plej longe partoprenis la laboron.

La tempo rapide pasis, kaj apenaŭ ni havis tempon vidi la belan filmon de s-ro Alvar Johansson pri la vojaĝo al la kongreso en Malmö, antaŭ ol ni devis trovi vagonaron, kiu nin fortrenis de sukcesinta kunveno.



S-ro Elg resumas la historion de Verda Rondo.

### La Ministro por instruado en Grekujo

rekomendas enkondukon de esperanto en la plej superaj klasoj de ĉiuj lernejoj en la lando. (La Folio).

### La medicina gazeto

"Giornale di Clinica Medica" en Italujo aperigas ĉiujn gravajn artikolojn krom en la itala lingvo ankaŭ en esperanto. (La Folio).

konsistas el s-ro Tage Pettersson, f-ino Agda Olsson, s-ino Berit Ahlqvist, s-ro Gillis Staberg kaj s-ro Ebbe Vilborg, ĉiuj en Göteborg. Tiu provizora estraro faru referendumon ĉe la esperantistoj en la nomitaj provincoj kun demando, ĉu oni deziras fondi tian distrikton aŭ ne. Se la jesaj vokoj estos sufiĉe multaj, oni kunvokos por nova kunveno, verŝajne en Göteborg.

**Hungara esperantisto fariĝis ministro.**

S-ro István M. Kossa, kiu jam antaŭ la mondmilito partoprenis en la hungara laborista esperantomovado — eĉ gvidis tramistan grupon — kaj post la milito dum 1945—1947 estis prezidanto de HESL, estis nomata la 6-an de aŭgusto Ministro de Industrio. Li estas en la gvidantaro de la Hungara Laborista Partio, kaj antaŭe gvidis la Hungaran Sindikatan Centron. (La Folio).

**Intersteno.**

El Italujo nin atingis la dua numero de Interstena Informilo. S-ro Joelsson el Köping ja eldonas similan.

**Mallonge**

9 Zamenhof-stratoj nun ekzistas en Polujo — en la urboj Warszawa, Krakow, Lodz, Bialystok, Zamoszez, Jelenia Gora, Strodborow, Gdansk kaj Wielni.

En Anglujo oni dum la jaro 1947 instruis kaj prelejis en esperanto en 91 lernejoj. Tiujn aranĝojn partoprenis 9272 lernantoj, 374 instruistoj kaj 395 studentoj.

En Hungarujo estas Esperantostratoj en dektri urboj.

La Hungara Esperantisto en sia laste alveninta numero pritraktas temon, kiun ni vere pli bone devus atenti. Oni petas la esperantistojn skribi al la hungara radio, kiu trifoje semajne sendas en esperanto. En Hungarujo loĝas la plej eminentaj el niaj esperantaj verkistoj kaj parolantoj, kaj nun oni petas, ke la esperantistoj petu ĉe la radio paroladajn de tiuj eminentuloj. La peto valoras, ke ni ĝin ripetu. Do, ni admonas niajn legantojn peti pri tiaj sendoj ĉe Radio-Budapest. Sandor-utca 7, Budapest VIII, Hungarujo. Ankaŭ bonvolu aŭskulti la sendojn!

Oni prilaboras manuskripton por nova Plena Ilustrita Vortaro. Tamen oni antaŭvidas, ke tiu libro ne aperos en la proksima estonteco.

La instruista seminario de Arras, Francujo, akceptis esperanton oficiale en la instruplano. (Svisa Espero).

Por policistoj de la ĉefurbo Den Haag, Nederlando, okazis oficiala esperantkurso kun ekzameno. La partoprenintoj, kiuj ĉiuj sukcesis en la ekzameno, ricevis de la urba administraro la oficialan premion, kiuj al la policistoj por ĉiu kroma fremdlingvo estas certigita. Dua kurso kun pliaj 25 policistoj komenciĝis.

La direktoro de la teknika instituto en Arnhem rigardas esperanton por la tekniko kaj scienco tre grava. Por la 9000 studentoj de la instituto komenciĝis kursoj, ĉar laŭ la opinio de la direktoro esperanto helpas por la instruado de la tekniko. Tiel ebligis al la studentoj korespondi kun kolegoj en la tuta mondo por pligrandigi la konojn. (Svisa Espero).

Esperanto estas instruata en la teknika altlernejo de "Fiat", Italujo. (Svisa Espero).

La ministro de klerigo en Varsovio informas per cirkulero, ke dum la jaro oni instruis esperanton kiel nedevigan studobjekton en 8 lernejoj de Krakow, inklusive de universitato. La kursojn gvidis prof. Sygnarski. (Svisa Espero).

Leteroj de Zamenhof, kolektitaj kaj komentitaj de prof. G. Waringhien, aperis meze de oktobro. Dika libro, eldonita de SAT. Prezo ne montrita. Recenzo sekvas.

**Teknika sekcio****Racia kaj internacia kemia nomenklaturado.**

(Kritikaj studoj pri la sistematiko kaj logiko de la kemia nomenklaturado) de dipl. ing. Curt Dellian, delegito de ISAE por Germanujo. Ricevebla kontraŭ 5 rpk ĉe Inĝeniera sekcio, Esperanto-Centro (GIS), Postfach 47, München 23, U. S. Zono, Germanujo.

La kajero en formato A 4 estas multobligita kaj ampleksas 36 paĝojn kaj presitan titolpaĝon. En ĝenerala parto la verkinto traktas la elekton inter trivialaj kaj raciecaj nomoj, postulojn de internacieco, precizeco kaj ekonomio. En speciala parto li sistemigas terminojn de neorganika kaj organika kemio. La lasta okupas plej grandan spacon, kaj 65 reguloj estas donataj pri vortfarado. Bildoj akompanas la paragrafon pri ciklaj kombinaĵoj.

Mi bedaŭras ke oni ne trovis eblecon presi aŭ almenaŭ multobligi sur pli bona papero tiun valoran kontribuon al la nomenklatura laboro.

**Scienca Rondo.**

Fakgazeto por: fiziko, kemio, medicino, biologio kaj similaj fakoj, nro 1—2 (duobla numero) 16 paĝoj.

Multobligita revuo en formato A 5 enhavanta unu artikolon originalan pri ĉiu el la supre nomitaj fakoj. Krome estas referataj kaj nomenklatura kolonoj. Prezo 3 rpk/nro, sama adreso. **Salex.**

Ni deziras ricevi (ev. aĉeti) por centra biblioteko: Esperanto-Folio (multobligita) ĉiujn numerojn de la jaro 1912.

Svenska Esperanto-Tidningen (La Espero).

1914: n-rojn 3, 6, 7, 8

1915: n-rojn 1 ĝis 10

1916: Ĉiujn numerojn

1917: n-rojn 1, 2, 11, 12

1918: n-rojn 2 ĝis 8

1919: n-rojn 1 kaj 5

1923: ĉiujn numerojn

1924: "

1930: n-rojn 7 kaj 8.

**Klubo Esperantista de Malmö.**  
Kamregatan 3, Malmö.

**ANDELSTECKNINGEN****i Förlagsföreningen Esperanto**

fortgår och styrelsen registrerar med tacksamhet den förståelse landets esperantister visar genom att på detta sätt stödja en av de livsviktigaste grenarna av vår rörelse.

Här följer redovisning över

**nyttillkomna andelsägare:**

Transport från föregående redovisningar	Kr. 2.600:—
Olle Olsson, Lund .....	2 andelar .. 100:—
Roland Dupuis, Stockholm ....	2 " .. 100:—
Ingemar Svensson, Tibro ....	1 " .. 50:—
Elisabet Olsson, Stockholm ..	2 " .. 100:—
+ andelskapital pr den 1. 1. 1948 .....	16.300:—
<b>Totalt kronor</b>	<b>19.250:—</b>

Ännu finns det möjlighet för svenska esperantister att bli delägare i Förlagsföreningen Esperanto och styrelsen emotser den studandande julen med de största förväntningar. En andel som julklapp är ju ingen zebra utan en penningplacering, som både givare, mottagare och icke minst förlaget har nytta och glädje av för all framtid.

Andelsbevis à 50:— kr. kan beställas genom att insända likvid till vårt postgirokonto 578, varvid beställningen skrives på talongen.

Med tack för visat intresse under det snart tillätdalupna 1948 tillönska vi Eder ETT GOTT NYTT AR och lovar göra vårt allra bästa för vårt förlags fortsatta framgång under 1949.

*Styrelsen för Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.*





## Mondfederalista sekcio de SEF

Komuniko de dec. 1948.

### Nordeŭropa Instituto en Svedujo.

La tasko de Universala Ligo estas inter alie funkciigi ampleksan sistemon de internacia amikiĝo, interrilatado kaj kunlaborado, per kreado de praktikaj servoj plifaciligaj la internacian komunikadon. Ĝuste por plenumi tiujn taskojn U. L. 1949 inaŭguros Nordeŭropan Instituton en Svedujo. Dank' al favoraj cirkonstancoj la instituto havos sidejon en Skövde, kie ni jam pasintan someron aranĝis tre sukcesan renkontiĝon internacian. La bone ekipita Studiegården (urba studhejmo) estas je nia dispono. En ĝi estas ricevebla ĉio: bona loĝejo, manĝoj, ĉambroj por prelegoj kaj studgrupoj. Cetere la hejmeca atmosfero ebligas trankvilan kaj amikecan kunstadon. Pri la programo de Nordeŭropa Instituto ni revenos. Ĝis nun ni povas menci, ke famaj prelegistoj, instruistoj k. a. jam promesis konstantan kunlaboron.

### Karavano al Bournemouth.

Por faciligi la vojaĝon al la venontjara Universala Kongreso en Bournemouth (Anglujo) Mondfederalista Sekcio de SEF jam nun preparas karavanan aranĝon. Versajne estos du grupoj: 1) per ŝipo de Gotenburgo al Tilbury — tien kaj reen kaj 2) per vagonaro tra Danlando, Germanujo kaj Nederlando. Ĉe la reiro vizito en Francujo kaj Belgujo. Atentu! Nur membroj de U. L. rajtas eluzi la favorojn de la karavano(j). Petu prospekton, skribante al Lennart Åberg, Poŝtfolio 16, Skövde.

### Atentu la aldonajon.

En tiu ĉi numero vi trovas aldonajon, kiun vi afable trastudu. Se vi jam ne estas membro, vi afable anoncu vin al U. L. Ĉu vi scias, ke 56 membroj de la sveda parlamento aliĝis al la mondfederalista movado? Nia afero marŝas antaŭen! Ni — en Universala Ligo — ĝuas la favoron de nia internacia lingvo Esperanto, propran internacian mondsistemon, ricevas bone redaktitan gazeton kun aktuala kaj interesa legaĵo, almanakon de U. L. kaj aliajn favorojn. Ne pre aliĝu ekde la nova jaro. Bonvenon!

## Föbunds-kassören har ordet

Antalet klubb- och direktanslutna medlemmar i SEF under innevarande år är ingalunda överväldigande, ehuru året uppvisar en ökning jämfört med 1947. Ännu har vi icke nått upp till medlemssiffran under förkrigsåren. Kongressen i Malmö visade, att det finns relativt gott om esperantister i vårt land, men långt ifrån alla är anslutna till något förbund. Varje esperantist bör betänka, att medlemsskap i SEF ger den bästa kontakten med såväl den svenska som den internationella esperantörörelsen, men att rörelsens livskraftighet och ställning beror på antalet medlemmar. **Är Du medlem i SEF?**

Klubbarna måste hjälpa till hundra procentigt, och den hjälpen ges helt enkelt så här: Använd SEF:s medlemsblock, som erhålles kostnadsfritt från förbundet. Insänd **samtidigt** med avgiftsredovisningen de härför avsedda kopiorna av medlemskortet, helst nummerade i löpande följd. Ange på postgirotalongen det antal fullt betalande och familjemedlemmar, som inbetalningen avser. Om icke medlemskort är tillgängliga, gör en uppställning över medlemmarna och insänd den. Vi tackar på förhand för Eder hjälp och önskar lycka till i medlemsvärningen.

Enocson.

## SVEDA KRONIKO

### Esperanto en Kungälv.

La 25-an de oktobro f-ino Inga Maj Adamson el Göteborg parolis en la bontempla lokalo de Kungälv pri: "Esperantokongresoj kaj internacia korespondado" kaj poste gvidis kurseton por demonstri la lingvon. Ĉeestis 70 aŭskultantoj kaj multaj sin notis por partopreni kurson, kiun gvidos s-ro Oscar Larsson.

### Esperanto en la lernejo de Hällevik.

En la popollernejo de Hällevik nun Esperanto estas studata de ĉirkaŭ 30 infanoj en la klasoj 5—7. Ankaŭ kelkaj pli aĝaj personoj aliĝis. Oni fondis esperantan klubon (Hällevika Esperanto-Klubo), kiu intencas ĉe novjaro 1949 aliĝi al SEF. Kiel kurslibro estas uzata Esperanto por la lernejo de Einar Dahl. Oni kunvenas por studado ĉiusemajne lunde dum 2 horoj. La klubo nun intencas aranĝi Luĉifeston por havigi al la kaso ion da mono. Prezidanto de la klubo kaj kursgvidanto estas instruisto Henry Ysner, Hällevik. La nombro de la klubanoj kaj partoprenantoj de la kurso ĉiam kreskas. Ankaŭ oni okupas sin pri kolektado de PM.

**Bonegaj prelegoj de Anna Alamo.** Pere de la novfondita Esperanto-klubo en Hällevik kaj en kunlaboro de eklezia pastro Henry Håkansson, Mjällby, prelego de Anna Alamo okazis dum paroĥa vespero en Hällevik la 23-an de oktobro 1948. Nur malmultaj plenkreskuloj ĉeestis sed ĉirkaŭ 70 infanoj. Sed tiuj, kiuj alvenis, estis pli ol kontentaj, kaj pastro Håkansson bedaŭris ĉiujn, kiuj ne venis kaj pro tio ne havis la okazon aŭskulti la brilegan prelegon de s-ino Alamo pri ŝiaj spertoj dum ŝia helplaboro en diversaj landoj. La 24-an de okt. s-ino Alamo prelegis en Hörviken ĉe kunveno de la loka Ruĝa-kruco. Ankaŭ tie s-ino Alamo bonege sukcesis. 2 prelegojn ŝi faris por infanoj: en Hällevik kaj Hörviken. Ŝia vizito certe estis bona propagando por esperanto. Ni esperas baldaŭ denove havi viziton de ŝi kaj tiam por grandega publiko.

### Klubkunvenoj.

La Esperantoklubo de ABF, Göteborg, kunvenas en la ejo en Pustervik ĉiun unuan kaj trian jaŭdon de la monato.

### Morariu

la 2-an de novembro prelegis en la esperantoklubo de Uppsala, la 16-an en Västerås publike. Lundojn li gvidas kurson por tramistoj en Sundbyberg kaj jaŭdojn publikan kurson en la popollernejo de Klara.



— Mi petas vian pardonon! Sed mi loĝas aliflanke de la barilo...

## Översättningstävlan

För att animera de svenska esperantisterna att översätta till och från esperanto har Förlagsföreningen Esperanto beslutat att anordna översättningstävlingar.

Denna första gång gäller det att översätta nedanstående svenska texter I och II till esperanto.

Tävlingsregler:

1. Den tävlande skall insända översättningen i tydlig skrift, helst maskinskriven i 3 exemplar. Använd endast ena sidan av papperet.
2. Tävlingsbidraget skall insändas före den 1 febr. 1949 till Förlagsföreningen Esperanto, Fack 19071, Stockholm 19.
3. De insända tävlingsbidragen förblir Förlagsföreningens egendom.
4. Tävlingsbidraget skall vara undertecknat med ett motto. Tävlingsdeltagaren skall samtidigt avlämna sitt namn och adress i förselat kuvert, som på utsidan skall vara försett med det motto, varmed tävlingsbidraget undertecknats.
5. Resultatet av tävlingen tillkännages i aprilnumret av Svenska Esperanto-Tidningen.
6. Tävlingsbidragen kommer att bedömas av en tävlingsjury bestående av: Stellan Engholm, Birger Gerdman och Ferenc Szilágyi. Juryns beslut är utan appell.
7. De bästa bidragen belönas med följande pris:
  - 1:a pris 25 kronor kontant.
  - 2:a „ 15 „ böcker efter eget val ur Förlagets katalog.
  - 3:e pris 10 kronor böcker efter eget val ur Förlagets katalog.

### I. Text ur svensk roman.

Men när Märít träffade Håkan om kvällen, så blev hon förskräckt av hans nyhet. Gåldbekymmer var okända för henne och därför dubbelt fruktansvärda. Hennes föräldrar var välbesuttna, till hennes hem hade aldrig någon länsman kommit och pantat. Och ingen var väl så illa ute som en bonde, som mist sina dragdjur. Hon ångslades för Håkans skull:

— Kan inte utväg skaffas för räntan?

Utväg, utväg — Håkan ger till ett skratt. Hela livet var en enda stor utväg, hur många tusen länsmän som än för omkring och missbrukade Guds och djävulens namn. Och det som fanns invärtes hos honom hade ännu ingen länsman förpantat.

Märít häpnade över hans lätta sinne:

— Tala klokt nu, Håkan! Var ska du finna råd?

Ingen råd alls skulle han söka mot detta. Med arbete fick han inte ihop de femhundra dalerna till räntan. Tigga ihop dem ville han inte, ty det var för stor skam. Men kanske gick det med tjuveri? Ville hon ta en påse med sig och följa med honom ut och stjäla i natt som blev? De var ju vana att gå smygvägar nu.

Så vred han bort allting med skämt, men Märít visste, att han var nödd att göra rätt för sig, hon visste att skuld skulle betalas av hederlig man.

— Hederlig? sade han. Vem är hederlig? Känner du näen?

Eller kunde hon säga, vem som sålde jord åt den förste bonden? Nej, det kunde hon inte, ty den förste bonden stal jorden. Så var nu alla bönder, som levde världen kring, denne tjuvs ättlingar. Om jorden var ärvd eller förvärvat, så var den i alla fall stulen från början. Det var enkelt att fundera ut detta, men lika sant var det ändå.

Märít svarade med iver och mente, att han fått det fel för sig. Den som odlat upp en åker, han hade ärligt betalt den med sin möda. Han var ingen tjuv, hans avkomma inte heller.

— Jag har mödat mej sju år på mina åkrar, men di ä inte mina än. De blir aldrig mina!

Till detta hade hon ingenting att säga. Nej, han skulle aldrig i tiden förvärva sin jord, hur mycket svett

## Aerveturado Brazilo-Svislando

Zürich, en novembro. (Esperanto-Press). La konata kompanio "Panair do Brazil" inaŝguris ĉiusemajnan kaj direktan kontakton inter Rio de Janeiro kaj Zürich. La flugo daŭras maksimume 30 horojn kun haltoj en Madrid, Lisboa, Dakar kaj Recife; la ŝipo bezonas normale almenaŭ 23 tagojn.

La grava kompanio "Panair do Brazil" estas fondita en 1929 en Rio de Janeiro kaj havas pli ol 3.500 oficistojn en la tuta Suda Ameriko; nun ĝi disponas pri 32 maŝinoj de la plej moderna konstruo, kun 150 pilotoj.

Ja la nuna flugo partoprenis la sinjoroj ministro Fernando LOBE (ministerio por eksterlandaj aferoj), D-ro Paulo SAMPAIO (prezidanto de "Panair do Brazil"), Ed. SCHOUERI (komerca direktoro de Panair), Joe CHASE (teknika direktoro) kaj Assis de CHATEAUBRIAND (prezidanto de la plej grava gazetara entrepreno en Brazilo). Akceptis ilin en Zürich la Brazila ministro en Svislando: S-ro Mario Moreira DA SILVA, la Brazila ĝenerala konsulo en Zürich: S-ro Pedro de PAULA LEITE, kaj la direktoro de la Zürich'a oficejo de Panair: S-ro Chs. SANDMEYER. La Zürich'a registaro invitis la eminentajn gastojn al solena vespermanĝo, kiu estis regata de la kora amikeco liganta ambaŭ polojn.

(Esperanto-Press.)

\*

La Universitato en Szeged, Hungarujo, estigis lektoroficon en esperanto.

\*

Esperanto-Fako de la Foire de Lyon pruvigis, kion oni povas atingi per esperanto. La foiro ricevis 3230 leterojn kaj poŝtkartojn el 52 landoj en esperanto. Do, samideanoj, skribu salut-kaj dankleterojn al esperantaj foiroj kaj radiostacioj!

han an gaw den. Och nu agde man rätt att utsöka hela skulden och ta gården ifrån honom, när han inte betalt sin ränta på den bestämda dagen. Så stod det till.

### II. Text ur dagstidning.

#### BELGISKT UTSKOTT FÖR KUNGAFRÅGAN

BRYSSEL 30 nov. — (TT-Reuter). Ett parlamentariskt och juridiskt utskott skall tillsättas för undersökning av "de författningens villkoren vid utövanheten av de kungliga prerogativerna".

Konseljpresident Spaak förklarar att den nya samlingsregeringen "inte ämnar försumma något tillfälle till ett närmande, som kan medföra en konstitutionell lösning av detta kinkiga problem".

I arbetslöshetsfrågorna skall ett utskott av industridkare och fackföreningsledare biträda regeringen som rådgivande organ. Man har gott hopp om att komma tillrätta med problemen genom en energisk löne- och prispolitik, ökad export och reparation av krigsskadorna.

NI HAR VÄL TILLGÅNG TILL LÄMPLIGA

## ORDBÖCKER?

Svensk-Esperantisk ordbok. 576 sid. Hft. 6:—, Inb. 7: 50.

Plena Vortaro. 2:dra originalupplagan. 512 sid. 15:—.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO  
Fack 19071 Stockholm 19

# LA TAGO DE LA LIBRO

Ĉe la tago de la libro, kiun ni ja festas la 15-an de decembro, ni deziras prezenti al nia legantaro tiun paroladon, kiun faris nia eminenta verkisto s-ro Stellan Engholm ĉe la 30-jara jubileo de Eldona Societo Esperanto en Stokholmo.

## Libroj kaj movado.

Antaŭ tridek jaroj fondiĝis Eldona Societo Esperanto. Antaŭ dudek jaroj ĝi transloĝis al la strato de la grandaj eldonejoj.

Tiuj tempospacoj estas ne mallonga periodo por eldonejo en nia epoko. Eldonejoj, kiuj tre modeste komencis antaŭ tridek, kvardek jaroj, estas nun grandegaj entreprenoj en luksaj eldonpalacoj. Preskaŭ ĉiuj homoj konas iliajn nomojn. Iliaj anoncoj kaj libroj atingas la plej malproksimajn loketojn.

Sed — se ni demandus literaturan kritikiston, librovendiston, bibliotekiston aŭ literaturamanton, kio estas Eldona Societo Esperanto, ili verŝajne povus doni nenium informon pri ĝi. Se ni demandus la verkistojn, kiuj vizitas la eldonejojn ĉe la eldoneja strato, ili nur skuus la kapon. Aliaj homoj en la lando, kiuj ne havas specialan rilaton al eldonado, kompreneble ne scias pli. Pri la ekzisto kaj agado de ESE scias nur kelkaj miloj da esperantistoj.

En la impona postkongresa numero de *Espero* troviĝas imponaj informoj pri la agado de la eldonejo. Mi tute serioze diras imponaj, ĉar nun mi rilatigas tiujn informojn ne al grandaj eldonejoj kaj tutlanda literatura vivo sed al la negranda nombro da esperantistoj en Svedujo kaj al tiu laboro, kiun dum la tridek jaroj plenumis la prizorgantoj de la eldonejo.

La informoj diras inter alie, ke la sveda ŝlosilo ĝis nun estas eldonita en 200.000 ekzempleroj. Se 25.000 estis kaj estas uzataj de lernantoj, 175.000 estis vendita aŭ disdonataj kiel propagando por nia lingvo. Tiam da personoj en Svedujo almenaŭ iomete konatiĝis kun esperanto. Mi supozas, ke ili almenaŭ dum kelkaj minutoj rigardis la donacitan aŭ aĉetitan libreton.

Tamen ni havas en Svedujo nun nur 2.000 organizitajn esperantistojn, kaj la ne organizitaj estas apenaŭ kalkulinde. Tio estas ekzemplo pri la spontanea intereso por esperanto kaj por la ideo de internacia lingvo.

Sistema Kurso aperis 1932. Ĝis nun ĝi eliris en 28.000 ekzempleroj. Iuj certe estis uzataj por propagando, sed tiu kvanto estas sensignifa kompare al la tuto. Preskaŭ 28.000 homoj en Svedujo do lernis aŭ komencis lerni esperanton laŭ tiu libro. Rilatigu tiun ciferon al la dirita nombro de esperantistoj, kaj vi havos same frapan ekzemplon pri la rezulto de lernado kaj instruado.

Se tiuj 28.000 homoj nun estus esperantistoj, la gravaj libroj de la eldonejo povus aperi en dek, dekkvin mil ekzempleroj, kaj multe da homoj povus informi nin, kio estas ESE kaj kie ĝi troviĝas. Se la 200.000 posedantoj de la ŝlosilo estus esperantistoj, niaj gravaj libroj povus aperi en kvindek mil ekzempleroj, la tuta lando scius, kio estas la esperanta eldonejo, la verkistoj sur la eldoneja strato povus tuj informi pri ĝi, kaj iuj el ili verŝajne jen kaj jen vizitus ĝin.

Rezonadi en kondicionala formo povas ŝajni senfrukta kaj eĉ sensenca. Tamen oni povas tiri valoran instruon ankaŭ el imagataj aferoj, se ili nur havas logikan rilaton al la realaj. La diritaj ekzemploj montras, ke la homoj estas malmulte influataj de nia rekta propagando, ke la propra, spontanea intereso estas preskaŭ nerimarkebla. Jam tio estas valora instruo. Ni atendu ne tro multe de rekta propagando. Malgraŭ tio ni ne tute forlasu la 200.000 ŝlosilojn. La homoj estas diversaj. Povas esti, ke ni povos pli bone adaptiĝi al ili, kaj tiel atingi almenaŭ iom pli bonon rezulton.

28.000 venditaj lernolibroj instruas al ni, ke komencita instruado ankaŭ ne signifas daŭre validan rezulton. Tio parte dependas de la naturo de la homoj. Sed parte ĝi dependas ankaŭ de ni, instruantoj kaj gvidantoj. Lernantoj estas sentemaj plantoj, kiujn oni


devas netrude sed zorge kaj fidele flegi. Per pli bona adaptiĝo al lernantoj kaj klubanoj kaj per starigo de pli bonaj laborprincipoj kaj labormetodoj ni eble estus povintaj konservi la duonon de la komenca nombro en la studundoj. 14.000 organizitaj esperantistoj en Svedujo ne estus malbona cifero. Eĉ la duono de tiu cifero ĝojigus nin.

En 1934 aperis Gösta Berling en 3.000 ekzempleroj. Svedujo havis tiam ĉirkaŭ 5.000 organizitajn esperantistojn. Kiom da membroj la internaciaj organizoj tiam havis, mi ne memoras, sed nun ili havas ĉirkaŭ 20.000. Mi kredas, ke Gösta Berling vendiĝis relative bone, sed rimarku: ankoraŭ nun, dekkvin jarojn post la apero, la eldono ne estas finvendita. Nevenditaj libroj per ĉiu jaro formanĝas iom de la kapitalo, kiun oni enmetis en ilin.

Oni ne rajtas postuli, ke ĉiuj aĉetu librojn. Krome Gösta Berling estas vaste legita en Svedujo kaj ankaŭ eksterlande. Tamen troviĝas multe da esperantistoj, kiuj ne legis ĝin, kaj por aliaj esperanta traduko de tiom grava libro devus esti interesa kiel traduko, same kiel nun *Sep Fratoj* al finnoj kaj svedoj. Se ni konsideras tion kaj konsideras la rilaton inter la eldonnombro kaj la nombro de efektivaĵaj esperantistoj, ni trovas, ke tia eldono estus povinta, jes, estus devinta elĉerpiĝi en du jaroj aŭ malpli.

Se ni ankoraŭfoje momente konsideras la ciferojn kaj faktojn, kiujn mi citis, ni komprenas, ke ne ĉiam estis facile gvidi la eldonejojn kaj zorgi pri ĝi. Ŝajne estis facile vendi ŝlosilojn kaj lernolibrojn. Sed oni havis la ambicion zorgi ankaŭ por plua evoluo de la kursfinintoj. Malgraŭ grandaj malhelpoj oni persistis en tiaj klopodoj.

Mi komencis per komparo inter ESE kaj la grandaj eldonejoj en la sama strato. Ankoraŭfoje mi alvokas vian imagopovon. Jen imagu, ke esperanta eldonejo ne ekzistus en Svedujo, ke ne ekzistus la libroj eldonitaj de ESE, krom eventuale la ŝlosilo kaj iu lernolibro



La esperanta ŝlosilo estas multe vendita. Tie ĉi fasko de tiaj ŝlosiloj el diversaj partoj de la mondo. (Ĉu vi vidas eraron, kiun ni faris?)

## L A S A N K T A N O K T O

el "Kristlegendoj" de Selma Lagerlöf.

Kiam mi estis kvinjara, mi havis tre grandan malĝojon. Mi apenaŭ scias ĉu de tiam mi havis pli grandan. Tiam mortis mia patra avino. Ĝis tiu tempo ĉiutage ŝi sidadis sur la angula sofo en sia ĉambro kaj rakontadis fabelojn.

Mi ne povas alion memori krom tio ke la avino sidadis rakontante de mateno ĝis vespero, kaj ni infanoj sidadis kviete apud ŝi aŭskultante. Tio estis rava vivo. Al neniu aliaj infanoj estis kiel al ni.

Ne multon mi memoras pri mia avino. Mi memoras ke ŝi havis belajn, kretoblankajn harojn, ke ŝi iris tre kurbigita kaj ke ŝi ĉiam trikadis ŝtrumpojn.

Mi ankaŭ memoras, ke rakontinte fabelojn ŝi kutimis meti sian manon sur mian kapon, kaj tiam ŝi diris: "Kaj ĉio tio estas tiel vera, kiel ke mi vidas vin kaj vi vidas min".

Mi ankaŭ memoras ke ŝi povociis kanti kantetojn, sed tion ŝi ne faris ĉiutage. Unu el tiuj kantetoj temis pri kavaliro kaj marvirino, kaj ĝi havis la rekantaĵojn: "Blovas frosta, frosta vento sur la mar".

Plue mi memoras malgrandan preĝon, kiun ŝi lernigis al mi, kaj psalmostrofon.

Pri ĉiuj fabeloj, kiujn ŝi rakontis al mi, mi havas nur malfortan kaj konfuzan memoron. Nur unu solan el ili mi tiel bone memoras, ke mi povus rakonti ĝin. Ĝi estas malgranda rakonto pri la naskiĝo de Jesuo.

Jen, tio estas preskaŭ ĉio, kion mi memoras pri mia avino, krom tio kion mi plej bone memoras, kaj tio estas la granda bedaŭrosento pri ŝia foresto.

Mi memoras tiun matenon, kiam la angula sofo staris malplena kaj kiam estis neeble kompreni kiel la horoj de 1' tago havos finon. Tion mi memoras. Tion neniam mi forgesos.

Kaj mi memoros ke ni infanoj estis alkondukataj por kisi la manon de la mortintino. Kaj ni timis fari tion, sed tiam iu diris al ni ke nun estas la lasta fojo, kiam ni povas danki la avinon pro ĉia ĝojo, kiun ŝi faris al ni.

Kaj mi memoras kiel fabeloj kaj kantetoj forveturis de la bieno, pakitaj en longan, nigran ĉerkon, kaj kiel ili neniam revenis.

Mi memoras ke io estis for el la vivo, kvazaŭ estus

eldonitaj de privatulo. Kia aspektus tiuokaze la sveda esperantomovado? Certe ĝi apenaŭ ekzistus.

Kaj kia ĝi aspektus, se eldonejo ekzistus sed estus eldoninta nur ŝlosilojn, lernolibrojn kaj vortarojn? Kredeble iom pli bona sed tute ne kiel nun, kvankam la nuna stato ne estas admirinda. Tiuj aliaj libroj donas al ni ian specialan kulturajn medion, kaj ili donas al ni kaj nia agado moralan apogon, kiu havas pli grandan signifon, ol ni ĝenerale konscias.

Jen vi vidas, ke ESE ne estas sensignifa, eĉ en komparo kun la grandeldonejoj. Iuj grandeldonejoj, kiom ajn konataj, povus malaperi, sed libroj de diversaj specoj tamen aperus, la kultura vivo neniel stagnus. La sola diferenco estus, ke la gajno de la komerco irus en aliajn manojn. Sed por ni eldonejo estas vivograva afero kvankam ni ne profitas de ĝi ekonomie aŭ eĉ perdas. Ĝi estas necesa rimedo por nia celado kaj agado.

Tiusece ĝi efektive estas nia eldonejo, eĉ se ni posedas nenian akcion en ĝi. Ĝi estas nia komuna laborrimedo, unu el la plej gravaj. Almenaŭ devus esti tiel. Sed la faktoj sugestas, ke estas tiel ne tute. Mi timas, ke la signifon de tiu situacio komprenas plene nur tiuj, kiuj laboras rekte en la servo de la eldonejo aŭ speciale interesiĝas pri ĝia funkcio.

Pro tiu situacio estiĝas la ĝis nun ĉiam aktuala demando, kiel fari la eldonejon sukcesna, kiel fari ĝin kiel eble plej utila. Ni celas ne al la granda gajno de la grandaj eldonejoj nek al ilia famo. Sed nia celado ankaŭ ne estas tiu de malgranda rondo de ekskluzivaj poetoj aŭ filozofoj. Vole nevole ni devas en nia movado atenti ne nur pri kvalito sed ankaŭ pri kvanto.

Oni povas uzi diversajn rimedojn por influu tiujn, kiuj tro malmulte konscias pri la signifo de nia entreprenado. Tamen ŝajnas al mi, ke principe ekzistas nur unu efika maniero por kreskigi la signifon de tia eldonejo, kia estas la nia. Ĝi estas: krei kaj eduki publikon, kiu sentos sin ligita al la entreprenado kaj fine komprenos, ke tiu efektive estas ĝia propra, ĝia propra laborinstrumento.

Eldonejo edukas per la libroj, kiujn ĝi eldonas. Ĝi povas fari tion ankaŭ per rekta informado al la publiko. Kvankam mi estas iomete ligita al la eldonadoj de ESE kaj tial povas ŝajni subjektiva juĝanto, mi kuraĝas diri, ke la libroj de nia eldonejo apartenas al la elito de la esperantaj eldonadoj. La informadon oni faras pere de Espero. Ĝi ŝajnas al mi tre bona. Ĉu la eldonejo do edukis al si publikon? Certe jes. Sed la publiko povus kaj devus esti pli granda.

Mi iris laŭ cirkla linio kaj revenis al la elirpunkto, kaj ŝajne mi nenion atingis. Jen resumo: Mi sugestis, ke la eldonejo tre malmulte signifas, kaj mi sugestis la kaŭzon de tio. Poste mi montris ke ĝi tamen havas tre grandan signifon, kaj mi sugestis, kiel tiu signifo povu kreski. Kaj fine mi asertis, ke la eldonejo, t. e. ĝiaj gvidantoj, efektive faris tion, kio estas farebla,

por eduki al si publikon, sed la sukceso estis ne granda kaj ni ne estas kontentaj.

Efektive la rezulto de mia rezonado estas malgranda. Neniu valoran laborplanon ĝi alportis, eĉ neniu novan bonan sugeston. Mi prezentis nur kelkajn faktojn kaj kelkajn imagojn kun rilato al tiuj faktoj. Sed ankoraŭfoje mi ripetis, ke tiuj faktoj kaj imagoj meritas multe, multe da atento de ni ĉiuj esperantistoj en Svedujo. Kaj la rezulto de tia pripensado povas fariĝi nur unu: ke instruantoj kaj grupgvidantoj provos pli bone solvi siajn taskojn, ke la esperantistoj ĝenerale pli konsciigos pri la signifo de la eldonejo kaj fariĝos pli bonaj subtenantoj, pli bonaj uzantoj de tiu grava laborinstrumento, ke la prizorgantoj de la eldonejo provos eldoni ankoraŭ pli bonajn librojn por ankoraŭ pli bone eduki sian publikon.

Ĉu tiu konkludo ŝajnas al vi tro malmulte valora, tro malmulte entuziasma? Nu, alian mi ne povas trovi. Alian ireblan vojon rilate al tiu flanko de nia movado mi ne vidas. Kaj memoru: irante piede paŝon post paŝo oni moviĝas ne rapide, sed se oni persiste daŭrigas, oni atingas sian celon. La ĉina filozofo Laoce diris: "Milmejla vojaĝo komenciĝas per la unua paŝo." ESE jam antaŭ longe faris la unuan paŝon. Jam delonge ni estas survoje. Ni provu plivigligi la humoron unu de alia por faciligi la iradon, ni helpu unu la alian en la malfacilaĵoj, kaj ni persiste daŭrigu.

La esperanta mondo estas vasta almenaŭ geografie, kaj ekzistas multaj esperantaj eldonejoj. Foje oni sugestas, ke estus pli bone centrigi la pli grandan parton de la eldonado. Certe estas iom da senco en tio, sed mi timas, ke tia entreprenado havas ankaŭ certajn malavantaĝojn. Mi ne parolos pri tio, ĉar la demando estas multe tro ampleksa por tiu ĉi kunveno.

Sed pri unu afero ni povas interkonsenti: estas tre dezirinde, ke ĉiuj esperantaj eldonejoj, kiuj meritas konsideron, kiel eble plej bone kunlaboru, kvankam ili estas memstaraj kaj pli malpli konkurencaj.

Tia kunlaboro ekzistas. La eldonejoj vendas librojn unu de alia. Pli mi ne scias pri tiu afero, sed mi supozas, ke oni povus pli intime kaj fruktodone kunlabori, ol kion nun okazas. Ni laboras ja ne por individua profito sed por komuna bono kaj progreso. Oni povus ekzemple interkonsiliĝi pri eldonotaj libroj, por ke diversaj eldonejoj ne eldonu samtempe tro samspecajn librojn, kio kredeble foje okazas. Oni povus interkonsiliĝi pri la ebloj por disvastigi en diversaj landoj eldonotan libron. Mi kredas, ke oni en multaj punktoj povus atingi konsiderindajn avantaĝojn, kaj el la vidpunkto de la esperanta agado kaj el nure ekonomia vidpunkto.

Tia kunlaboro povas ja okazi letere, sed mi kredas, ke persona konferenco inter reprezentantoj de la eldonejoj estus tre bona afero. Certe okazus dum la internaciaj kongresoj malpli gravaj fakkunvenoj, ol estus tia.

S. Engholm.



fermita la pordo de tuta bela, sorĉita mondo, kie ni antaŭe povis libere eniri kaj eliri. Kaj nun troviĝis neniu, kiu komprenis malfermi tiun pordon.

Kaj mi memoras ke ni infanoj iom post iom lernis ludi per pupoj kaj ludiloj kaj vivi kiel aliaj infanoj, kaj tiam ja povus ŝajni kvazaŭ ni ne plu sentus la foreston de nia avino aŭ memorus ŝin.

Sed ankoraŭ en ĉi tiu tago, post kvardek jaroj, kiam mi kolektas tiujn legendojn pri Kristo, kiujn mi aŭdis en la Oriento, vekigas en mia interno tiu malgranda legendo pri la naskiĝo de Jesuo, kiu la avino kutimis rakonti. Kaj mi ekhavas la deziron rakonti ĝin ankoraŭfoje kaj lasi ankaŭ ĝin enigi en mian kolekton.

Estis kristnaska tago, kiam ĉiuj veturus al la preĝejo krom la avino kaj mi. Mi kredas ke ni estis solaj en la tuta domo. Ni ne povis kunveturi ĉar la unu estis tro juna kaj la alia estis tro maljuna. Kaj ni ambaŭ estis malĝojaj ĉar ni ne povis veturi al la frumeso kaj vidi la kristnaskajn kandelojn.

Sed kiam ni sidis tie en nia soleco, la avino komencis rakonti.

"Estis viro", ŝi diris, "kiu eliris en la mallunan nokton por pruntepreni fajron. Li iris de kabano al kabano kaj frapis. 'Kara, helpu min!' li diris. 'Mia edzino ĵus naskis infanon, kaj mi devas fari fajron por varmigi ŝin kaj la etulon.'

Sed estis profunda nokto, kaj do ĉiuj homoj dormis. Neniu respondis al li.

La viro iris kaj iris. Fine li ekvidis fajrobrilon luman-tan malproksime. Li tiam iris en tiu direkto kaj vidis ke la fajro brulas ekstere sub libera ĉielo. Aro da blankaj ŝafoj kuŝas dormante ĉirkaŭ la fajro kaj maljuna paŝtisto sidas gardante la gregon.

Kiam la viro, kiu volis pruntepreni fajron alvenis al la ŝafoj, li vidis ke tri grandaj hundoj kuŝas dormante ĉe la piedoj de l' paŝtisto. Ili vekigis, ĉiuj tri, kiam li venis, kaj malfermis siajn larĝajn faŭkojn, kvazaŭ ili volus boji, sed nenia sono aŭdiĝis. La viro vidis ke la haroj stariĝas sur iliaj dorsoj, li vidis ke iliaj akraj dentoj lumas brile blankaj en la lumo de la fajro kaj ke ili kuregas kontraŭ lin. Li sentis ke unu el ili mordkaptas lian kruron kaj unu lian manon kaj ke unu pendiĝas je lia gorgo. Sed la makzeloj kaj la dentoj, per kiuj la hundoj devus mordi, ne volis obei ilin, kaj la viro ne suferis la plej etan difekton.

Nun la viro volis pluiri por ricevi kion li bezonas. Sed la ŝafoj kuŝis tiel dense unu apud la alia, dorso al dorso, ke li ne povis aliri. Tiam la viro ekpaŝis sur la dorsojn de la bestoj kaj iris sur ili al la fajro. Kaj neniu el la bestoj vekigis aŭ movis sin."

Ĝis tie la avino povis rakonti neĝenite, sed nun mi jam ne povis ne interrompi ŝin. "Kial ili ne vekigis, avino?" mi demandis. "Tion vi ekscios post momento", diris la avino kaj daŭrigis sian historion.

"Kiam la viro preskaŭ atingis la fajron, la paŝtisto eklevis la rigardon. Li estis maljuna, grumblema viro, kiu estis malafabla kaj malmilda al ĉiuj homoj. Kiam li vidis fremdulon veni, li ektiris al si longan, pikan bastonon, kiun li kutimis teni en la mano, kiam li paŝtas sian gregon, kaj jetis ĝin kontraŭ lin. Kaj la bastono sible flugis rekte kontraŭ lin, sed antaŭ ol ĝi trafis lin, ĝi flankeniĝis kaj siblis preter li malproksimen al la kampo."

Kiam la avino atingis tien, mi interrompis ŝin denove. "Avino, kial la bastono ne volis bati la viron?" Sed la avino ne respondis al mi sed daŭrigis sian rakonton.

"Nun la viro alvenis al la paŝtisto kaj diris al li: 'Kara, helpu min kaj pruntedonu al mi iomete da fajro! Mia edzino ĵus naskis infanon kaj mi devas fari fajron por varmigi ŝin kaj la etulon.'

La paŝtisto preferes estus rifuzinta, sed kiam li pripensis, ke la hundoj ne povis difekti la viron, ke la ŝafoj ne forkuris pro li kaj ke la bastono ne volis fali ĝi lin, li ektimis iomete kaj ne kuraĝis rifuzi al li kion li postulis.

'Prenu tiom, kiom vi bezonas!' li diris al la viro.

Sed la fajro estis preskaŭ elbrulinta. Tie ne restis ŝtipoj aŭ branĉetoj, sed nur granda amaso da ardaĵoj, kaj la fremdulo havis nek ŝovelilon nek ĉerpilon, en kiu li povus porti la ruĝajn karbojn.

Kiam la paŝtisto vidis tion, li diris denove: 'Prenu

tiom, kiom vi bezonas!' kaj li ĝojis ke la viro ne povos kunporti fajron.

Sed la viro sin klinis, kolektis karbojn el la cindro per nudaj manoj kaj metis ilin en sian mantelon. Kaj la karboj nek brulvundis liajn manojn, kiam li tuŝis ilin, nek bruldifektis lian mantelon, sed la viro forportis ilin, kvazaŭ ili estus nuktoj aŭ pomoj."

Sed ĉi tie la fabelrakontantino estis interrompata je la tria fojo. "Avino, kial la karboj ne volis brulvundi la viron?"

"Tion vi jam ekaŭdos", diris la avino, kaj tiam ŝi rakontis plu.

"Kiam tiu paŝtisto, kiu estis tre malbona kaj grumblema homo, vidis ĉion ĉi, li komencis demandi al si mem: 'Kia nokto ĉi tiu povas esti, ĉar la hundoj ne mordas, la ŝafoj ne timas, la lanco ne mortigas kaj la fajro ne bruligas?' Li revokis la fremdulon kaj diris al li: 'Kia nokto estas ĉi tiu? Kaj de kio dependas, ke ĉiuj objektoj montras al vi kompaton?'

Tiam diris la viro: 'M ne povas tion diri al vi, se vi ne mem vidas tion.' Kaj li volis foriri por baldaŭ povi ekrbuligi fajron kaj varmigi sian edzinon kaj la infanon.

Sed tiam la paŝtisto pensis, ke li ne volas perdi lin el vido, antaŭ ol li ekscios, kion povas signifi ĉio ĉi. Li levigis kaj postiris lin, ĝis li venis tien, kie li estas hejme.

Tiam la paŝtisto vidis, ke la viro eĉ ne havas kabanon, en kiu loĝi, sed ke li havas siajn edzinon kaj infanon kuŝantaj en monta kaverno, kie troviĝas nenio alia krom nudaj, malvarmaj ŝtonmuroj.

Sed la paŝtisto pensis, ke la kompatinda senkulpa infano eble frostmortos tie en la kaverno, kaj kvankam li estis malmolkora viro, li kortuŝigis kaj opiniis ke li volas helpi la infanon. Kaj li malfiksis sian dorsoŝakon de la ŝultro, kaj el ĝi li prenis molan kaj blankan ŝafofelon, donis ĝin al la fremda viro kaj diris ke li lasu la infanon dormi sur ĝi.

Sed en la sama momento, kiam li montris ke ankaŭ li povas esti kompatema, liaj okuloj malfermiĝis, kaj li vidis kion antaŭe li ne povis vidi kaj aŭdis kion antaŭe li ne povis aŭdi.

Li vidis ke ĉirkaŭ li staras densa rondo de etaj argentoflugilaj anĝeloj. Kaj ĉiu el ili tenas kordinstrumenton en sia mano, kaj ĉiuj kantas per laŭta voĉo, ke hodiaŭ estas naskita la Savanto, kiu savos la mondon de ĝiaj pekoj.

Tiam li komprenis ke ĉiuj objektoj estas tiel ĝojaj en ĉi tiu nokto, ke ili ne volas fari ion malbonan.

Sed ne nur ĉirkaŭ la paŝtisto troviĝis anĝeloj, sed li vidis ilin ĉie. Ili sidis en la kaverno kaj ili sidis ekstere sur la monto kaj ili flugis sub la ĉielo. Ili venis piedire sur la vojo en grandaj aroj, kaj preterirante ili haltis kaj jetis rigardon al la infano.

Estis tia gajejo kaj tia ĝojo kaj kantado kaj ludado, kaj ĉion ĉi li vidis en la malluma nokto, kie antaŭe li povis nenion distingi. Li tiom ekĝojis ĉar liaj okuloj estas malfermitaj, ke li kliniĝis sur siajn genuoj kaj dankis al Dio."

Sed kiam la avino venis tien, ŝi ĝemetis kaj diris: "Sed kion tiu paŝtisto vidis, tion ankaŭ ni povus vidi, ĉar la anĝeloj flugas sub la ĉielo ĉium kristnaskan nokton, se ni nur kapablus distingi ilin."

Kaj tiam la avino metis sian manon sur mian kapon dirante: "Ĉi tion vi memoru, ĉar ĝi estas tiel vera, kiel ke mi vidas vin kaj vi vidas min. Ne dependas de kandeloj kaj lampoj, ne gravas luno kaj suno, sed necesa estas tio, ke ni posedas tiajn okulojn, kiuj povas vidi la gloron de Dio."

Tradukis  
Birger Gerdman.

## "LA JUNA VIVO"

Internacia organo por La Junularo, Amikoj de la Junularo kaj Geinstruistoj: 16-paga, ilustrita organo, presita sur bonkvalita papero. Tre interesa enhavo por ĉiuj esperantistoj. Aperas 10-foje jare. Jarabono 3.50 sv. kr. Petu specimenon de TJO-Centro, West-Graftdyk, Nederlando. Oni povas aboni pere de

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO  
Postgiro 578 Stockholm 19

# LA SVEDA VINTRO



Milda vintro.

Malsame aspektas la klimato en la diversaj partoj de lando, kiu estas tiel longa en la direkto nord-suden kiel estas nia lando. En la plej norda parto la temperaturo povas malaltiĝi ĝis 30 kaj 40 celsiaj gradoj sub nul, en la sudaj partoj temperaturo sub 10 frostogradioj ne estas tre ofta.

En la milda apudmara klimato de la okcidenta bordo ni plej ofte havas malmulte da neĝo, sed multe da nebulo kaj malseko. Tiu klimato estas tre griza kaj prema por la humoro. Svedoj certe preferas la pli mordantan sed pli freŝan veteron en la interno de la lando.

Kiam oni parolas pri la vintra vetero, kompreneble oni tute ne rajtas kredi, ke ĉiuj vintroj estas similaj. Grandaj diferencoj troviĝas. La bildo, kiu montras viron nutrante birdojn estas fotografita en Göteborg. La akvo foje tute ne surglaciĝas dum la vintro. Ofte restas almenaŭ iu truo en la glacio, kie povas ĉirkaŭnaĝi la akvobirdoj.

La bildo kun la neĝo sur la pinoj estas el pli norda parto. Dekojn da kilometroj vi povas migri tra tiu silenta, blanka naturo, ne vidante homan konstruaĵon aŭ aŭdante alian sonon ol la pepadon de birdoj, kiu suferas pro la frosto. De tempo al tempo vi vidas la spurarojn de iu vulpo aŭ leporo. La ĉielo estas verda pro la malalta temperaturo, sed vi ne sentas la froston, kiam vi provas venki la metro-profundan neĝon, kiu kovras la teron. Plej facile vi povas veni antaŭen sur paro da skioj. Iom da freŝeco por la korpo vi ricevas kiam vi neatente puŝiĝas al branĉo kaj pro tio neĝamaso falas sur vian nukon.

Estas ege bele, en bela vetero promeni tra tia arbaro. Sed la sama belo ĉiam ripetiga, ĉiam ripetiga. Fine vi enuas kaj volas hejmeniri al panjo kaj eksidi

antaŭ varma forno malantaŭ fenestroj, kiujn la morda frosto ornamis per la plej belaj floroj de la mondo.

Unu el niaj bildoj montras aŭtomobilon, kiun junuloj ŝarĝas per neĝo. Temas pri pretigado de iu glitkurejo. Ĉar la neĝo estas relative multa kaj ofta, ne ĉiam oni havas liberan glacian surfacon por vetkuradoj aŭ pilkludoj surglitilaj. Tiam oni devas forigi la neĝon de certa surfaco, kaj kun fervoro la junuloj en la sabata vespero post la fino de la laboro aliras la penon de forŝovelado de la neĝo — por en la dimanĉa mateno trovi, ke la glacio denove estas kovrita per pli ol vatomola tavolo de plej pura, plej blanka, plej delikata neĝo.



Pretigado de la glitejo.

## Kiu li estis?

Novelo de Ulf Flygare. Esperantigita de Bengt Ekström

Estis je la 6-a kaj tempo por fermi la malgrandan panbutikon, kiu troviĝas apud la ĉefstrato de la vilaĝeto Öståkra. Sur la ĝitiga strato venas subite dika viro en la mezaj jaroj, kun elstrantaj okuloj, kurante kaj spiregante kiel lokomotivo.

Li ekkaptas la tenilon de la malgranda pordo, ĝuste kiam la komizino intencas ĝin fermi. Farigas tirado dum kelkaj minutoj. La komizino tiras al unu direkto, al alia tiras la dika viro en la mezaj jaroj.

— Lasu la tenilon, mi devas enveni, elsiblas la viro kun la elstarantaj okuloj.

La komizino, kiu ŝatas virojn, kiuj povas malkaŝe eldiri sian opinion, kiam tio estas bezonata, malfermis fine la pordon. La dika viro ruliĝas malzorge en la malgrandan butikon.

— Nu, kion vi volas? demandas la komizino tremvoĉe.

Pli detale rigardante ŝi malŝatas la viron kun la elstarantaj okuloj. Sed estas pardoninde. Evo ŝanĝas ja opinion tiel ofte kiel ŝi ŝanĝas ŝtrumpojn.

— Mi volas havi mian longan panbulon, kiun mi aĉetis ĉi tie hieraŭ.

— Longan panbulon?

— Jes, ĝuste longan panbulon. Ĉu estas stranga, tio? Mi volas havi mian longan panbulon, kiun mi pagis hieraŭ per kuponoj kaj mono. Ĉu vi ne memoras tion, fraŭlino?

— Ne, bedaŭrinde mi ne povas memori tion, diras la komizino. Tute ĵus mi eniris tiun oficon, kaj estas malfacile memori ĉiujn vizaĝojn.

— Sed... mia kara fraŭlino... mi estas konfidata persono en tiu ĉi vilaĝo, kaj mi aĉetas ĉi tie ĉiutage.

— Mi povas absolute ne elliveri tiun longan panbulon antaŭ ol konsulti la ĉefon. Mi estas ĉi tie nur prove, kaj mi volas prizorgi mian oficon laŭorde.

— Ĉu vi ĝis nun ne vidis la ĉefon? Li estas unu el miaj plej intimaj amikoj. Mi multe ŝatas la viron, diras la viro kun la elstarantaj okuloj.

— Ne, mi neniam vidis la ĉefon antaŭe, sed mi renkontos lin hodiaŭ vespere por havi la informon ĉu mi ricevu la oficon aŭ ne.

La viro kun la elstarantaj okuloj rigardas ekzamenante la junan knabinon, kiu staras malantaŭ la vendotablo en la malgranda panbutiko de Öståkra.

Fine li diras, hezite elparolante la vortojn:

— Ĉu mi do ne ricevos mian longan panbulon?

— Ne, respondas la komizino neŝangeble.

— Bone! Vi havu la oficon, fraŭlino!

La knabino rigardas demandeme la dikan viron kaj diras fine:

— Mi ricevu la oficon! Kion vi celas? Tion ja ne vi povas decidi. Estas afero por la ĉefo.

La dika viro kun la elstarantaj okuloj ekridas brume, kaj la komizino reiras timigita. Kiam la viro fine ĉesigis la ridadon, li diras:

— Mi volas klarigi ĉion. Mi estas via ĉefo. Mi nur volis kontroli, ke vi estas honesta. Estas manko de tiaj personoj nun, tial oni devas elmeti la homojn al provado por scii, kiu spirito ilin regas.

La komizino kaptas la manon de la ĉefo kaj riverencas profunde antaŭ la granda viro.

— Dankon, ŝi diras fine.

### Bismarck interdiras.

En la jaro 1855 en Frankfurto ĉe Majno, okaze de la federacia kunveno, oratoro, — iu ministro de malgranda ŝtato — longe paroladis. La parolado estis plena je neveraĵoj. Subite la oratoro kun pli alte sonanta, akcentanta voĉo jene daŭrigis:

— Sinjoroj! Estas ĝenerale sciante pri mi, ke mi de post mia infanaĝo kvazaŭ edziĝis kun la vereco, kun la justeco...

Je tiu ĉi rimarko Bismarck leviĝis, demandante:

— Kaj de kiam via ekscelenca Moŝto estas vidvo?



Dekojn da kilometroj vi povas migri tra tiu silenta, blanka naturo...

## Bilancio

Kiam Johano Holbein, la fama germana portretisto en la kortego de Henriko la VIII-a pentris portreton de unu el korteganoj de la angla reĝino, la interesiĝantoj ofte tedis lin dum la pentrado. Holbein estis tre kolektigita pro la maldiskreta scivolemo de la tedantoj.

Foje, kiam lordo forpuŝante la serviston ĉe la pordo, enpaŝis en la laborĉambron spite de la malpermeso de Holbein, la granda majstro tiagrade ekkoleris, ke li propramane eligis la lordon, kvankam la lordo estis speciale favorita de reĝo Henriko.

Sed Holbein jam post kelkaj minutoj, kiam li rekvietiĝis, pensis je la eventuale gravaj konsekvencoj de sia ago. Senprokraste li mem aperis antaŭ la reĝo kaj petis senkulpigon pro sia fuŝrapida konduto.

La reĝo tuj pardonis al li, eĉ tre bone amuziĝis pri la okazintaĵo. La ofendita aristokrato denuncis Holbein ĉe la tribunalo. La juĝistaro kondamnis Holbein je peto de pardono, sed la lordo ne kontentiĝis je tiel malsevera puno kaj apelaciis al la reĝo.

Henriko la VIII-a rifuzis la plenumon de la peto de la lordo, jene argumentante:

— Pripensu, — li diris — ke mi kiam ajn povos fari el sep kamparanoj sep lordojn, sed el sep lordoj mi ne sukcesus fari eĉ unusolan Holbein.

# La svedaj rulŝtonaj gruzdorsoj kaj ilia graveco

Kiam la granda revolucio kaj renversisto, kiu tamen ankaŭ estis la plej grava kvaternara konstruisto de Svedlando, la skandinava landglaciego, antaŭ kelkaj jarmiloj retiriĝis por ripozi je siaj laŭroj, li postlasis landon, senforman kaj dezertan. Gruzo kaj ŝtonoj, ŝtonoj kaj gruzo, jen lia superflua, en la tuta lando sternita postlasajo. Verdire li postlasis ankaŭ pli malgrandan materialon, formitan en ebenejoj de sablo, humosablo kaj argilo. Sed el gruzo kaj ŝtonoj li tamen konstruis la plimulton kaj la plej imponajn de siaj konstruaĵoj. Ĉi tiuj, kvankam geneze samspecaj, montras depende de la traktado de la materialo kaj la konstruomaniero malsimilajn formojn kaj stilojn. El tiuj ĉi eble tiu, en kiu la strangaj rulŝtonaj gruzdorsoj estas konstruitaj, estas la plej elstara kaj atentita.

La rulŝtonajn gruzdorsojn la geologoj frue atentis, kaj oni multe spekulativis pri ilia deveno. Nur lastatempe pro la sciigoj kaj spertoj, per kiuj la studado de la grenlanda glaciokovraĵo kaj aliaj glaciŝtupoj riĉiĝis nian scion pri la landglaciego, oni tamen povis starigi plene akcepteblan teorion pri ilia formiĝo. La rulŝtonaj gruzdorsoj estas glaciejriveraj sedimentoj, t. e. ili estas konstruitaj de degelakvaj riveroj de la glacio. La dum la somera duonjaro sur la landglaciego estita degelakvo tra fendoj kaj krevajoj subfluis al la glacieja fundo, kie ĝi amasiĝis en riverojn aŭ riveretojn, kiuj en tunelaj pasejoj trovis vojon al la glaciando. Kaŭze de la forta

premo de la grandegaj akvokvantoj la akvo en ĉi tiuj riveroj rapidege kaj sendepende de la topografio fluis al ia glaciando. La akvo estis antaŭenmovata sammaniere kiel en arteza putoj aŭ en nuntempaj akvotuboj. Je tiaj cirkonstancoj la riveroj kompreneble havis kolosan transportkapablon, kaj ili forŝiris kun si grandegajn amasojn da morena materialo, kio troviĝis en la glacio. Ĉi tio estis frotata, frapata kaj rondata dum la transporto al la glaciando, kie ĝi estis sedimentata pli aŭ malpli proksime al la riverbuŝo, depende de la grajn-grandeco kaj la kvalito de la materialo.

Se la glaciejaj riveroj enfluis en la maron aŭ se ili buŝis sur la tero, estiĝis malsimilaj formoj de sedimentoj. Je la unua okazo la rapido de la akvo tuj malpliĝis, kaj la kunportata materialo tuj ekster la riverbuŝo surfundiĝis je grandaj altaĵetoj kun la plej dikgrajna materialo plej proksime al la glacieja pordo. Ĉiujare estiĝis nova tia altaĵo, ordinare tamen tiel proksime al la antaŭa, ke ili kuniĝis al eble iomete dentforma longaltaĵo. Kelkfoje tamen ekzistas mallonga distanco inter la malsamaj altaĵetoj, kaj en tiaj lokoj oni nun povas vidi longajn vicajn da dorsaltaĵoj. La tiel submarine estiĝintaj gruzdorsoj, kiuj komence eble estis akreformaj kaj pintodorsaj, je la teraltiĝo estas rondigitaj kaj iom ebenigitaj. La etgrajna materialo en la ekstera partoj ofte estas forlavita kaj ĉe la flankoj de la gruzdorso sedimentita kiel marbordaj terasoj. Poste la dorsojn grandparte kovris en la akvo surfundiĝantaj sedimentoj, ekz. argiloj.

Tie, kie la glaciejaj riveroj buŝis sur la tero, la flurapido de la akvo nur iom post iom malpliĝis, kaj pro tio la sedimentoj ordinare estas sternitaj kiel vastaj gruzebenajoj. Nur esceptokaze ili formas akredorsajn longaltaĵojn, kaj supozeble ili tiam estas surfundiĝintaj interne de la glaciitunelo. Apud aŭ en la proksimo de la rulŝtonaj gruzdorsoj kaj -ebenajoj oni tre ofte trovas sedimentojn de pli etgrajna materialo, ekz. sablo kaj humosablo. Tria speco de rulŝtonaj formiĝoj estas la t. n. randteraso. Ili estas deltoj de gruzo, kiuj estiĝis, kiam la glaciejrivero enbuŝis en malprofunda akvo, kaj se okaze de la glaciando longan tempon estis lokfiksitaj, ili fariĝis tre ampleksaj. Ĉi tiuj nun nomitaj rulŝtonaj ebenajoj kaj randteraso kompreneble ne estas rulŝtonaj gruzdorsoj je kutima signifo. Sed ĉar ili fariĝis sammaniere kiel la gruzdorsoj kaj ankaŭ havis preskaŭ la saman gravecon por la kulturo, estus ne korekte tute malatenti ilin ĉi tie.

La rulŝtonaj gruzdorsoj ordinare etendiĝas en nord-suda direkto. Ĉi tio estas natura konsekvenco de tio, ke la glacio sinseke fordegelis norde, ĉe kio la glaciejriveroj, por povi fortransporti la konstante de norde venantan akvon, devis preni la nomitan direkton. Frapanta estas, ke la gruzdorsoj plej ofte havas kun la glaciejaj kanaloj paralelan direkton, fakto kiu en la komenco de la 19-a jarcento rezultigis "la diluvteorion", t. e. kaj gruzdorsoj kaj kanaloj estus memoraĵoj de diluvo, kiu pro teraltiĝo de Skandinavio estus disvastiginta sur la tero. Ofte la gruzdorsoj disbranĉiĝas norde, kaj sur la landkarto ili montras frapantan similecon al riversistemoj.

La materialo, el kio la gruzdorsoj konsistas, plejparte devenis de solida rokogrundo, situanta tuj norde de la sedimentloko. Rulŝtonoj tamen ekzistas, precipe tiaj de malmolaj rokaĵoj, kiuj estas transportitaj plurajn dekojn da mejloj. Tiel oni en Uppsalaåsen (la gruzdorso de Upsala) proksime de la lago Mälaren trovis rokaĵojn el ĉirkaŭ Gävle, kaj en Börstilaåsen en norda Uppland troviĝas andesito, kio estas transportita de Delsbo en Hälsingland.

De la antaŭa priskribo oni povas kompreni, ke la gruzdorsoj devas troviĝi plejparte en tiaj regionoj, kiuj situas pli malalte ol la post la landglaciego plej alta marbordo. Plej multnombraj ili estas en la provincoj

## Korelativa tabelo

	i-	ti-	ki-		ĉi-	neni-
			疑問	關係		
	不定	指示			一般	否定
代名詞	-o もの こと	io あること あるもの そのこと そのもの	tio そのこと そのもの	kiu なにごと なに (そのこと あり……する ところの)	ĉiu すべての 哪、物	nenio なにも… …ぬ
代形詞	-a 性質	ia ある種の	tia そんな	kia どんな (そのよう な)……であ るところの)	ĉia あらゆる	nenia どんな… も…ぬ
代名詞	-es 所有	ies だれかの	ties その人の	kies だれの (そのの～ あり……する ところの)	ĉies 各人の すべての	nenies だれも… も…ぬ
代名詞	-e 場所	ie どこか	tie そこに	kie どこに (そこで)… …するところ の)	ĉie いたる所	nenie どこにも …ぬ
代名詞	-al 理由	ial なぜか	tial それゆえ	kial なぜ… …するゆ え	ĉial …	nenial …
代名詞	-el 方法	iel どうにか	tiel そんなに	kiel どうして として	ĉiel …	neniel どうし も…ぬ
代名詞	-am 時	iam いつか	tiam そのとき	kiam いつ… …すると き	ĉiam いつも	neniam いつも… …ぬ
代名詞	-om 數量	iom いくらか	tiom それだけ	kiom どれだけ …するだ け	ĉiom すべて	neniom すこしも …ぬ

En japana esperantogazeto ni trovis la supran korelativan tabelon. Por ni okcidentuloj ĝi ŝajnas ne tre simpla. Precipe tiu kolono, kiu havas la surskribon ki-ŝajnas iom komplika. Sed en la kristfesta libertempo vi certe finstudos la tuton.



ĉirkaŭ la lago Mälaren, kie ili, precipe en ebenaj regionoj, superregas la ĉirkaŭajn kaj donas al la pejzaĝo specialan aspekton. Ilia alteco super la ĉirkaŭo ne estas tre impona, ordinare nur 20 ĝis 30, kelkfoje ĝis 60 metrojn. Je boradoj en kaj apud la gruzdorsoj oni tamen trovis, ke ilia alteco estas multe pli granda. La gruzdorso ĉe Uppsala altiĝas 34 metrojn super la ebenaĵo, sed ĝi estas kovrita de pli ol 100 metrojn dikaj argilsedimentoj, kaj tial la efektiva alteco estas proksimume 140 metrojn. La gruzdorsoj ofte estas tre longaj. Verdire ili tie kaj ĉi tie estas disrompitaĵoj, kelkfoje ĉar la gruzdorsa materialo surfundigis en apartaj altaĵoj, kelkfoje ĉar ili estas kovrita de pli malfruaj sedimentoj, sed ordinare la interrompoj ne estas pli grandaj, ol ke oni facile povas determini la interrilaton de la malsamaj dorspartoj. Impona gruzdorso estas Enköpingsåsen, kiu tiriĝas tra la provinco de Mälaren kaj atingas la maron ĉe la urbo Trosa. Norden ĝi, sub la nomo de Ockelboåsen, daŭrigas preter Sandviken, Ockelbo kaj Lingbo kaj perdiĝas en la montetaj regionoj de Hälsingland. Ĝia longo estas minimume 300 km. Ankaŭ pli longa tamen estas Uppsalaåsen. Ĝi transiras Södertörn kaj Uppland, eliras en la maron ĉe la buŝo de Dalälven kaj ree supereniĝas teren ĉe Sandarne en Hälsingland, de kie ĝi daŭrigas internen en la lando. La tuta longo estas proksimume 450 km. La grandiozaj gruzdorsoj, kiuj troviĝas en ĉi tiuj regionoj, ne havas egalaĵojn en la tuta mondo.

La graveco, kiu la ruĝstonaj gruzdorsoj havis kaj ankaŭ havas por la kulturo en nia lando, estas treege frapanta. Precipe ili havis grandan influon je la komunikoj kaj ilia evoluo. Kiam la unuaj koloniistoj penetris en la landon, ĉi tiu estis malfacile trairebla, kaj la sekaj, ebenaj gruzdorsosuproj pli bone ol ĉia alia tero taŭgis al vojoj. Pro tio ili certe krom la akvovojoj fariĝis la ĉefaj trafikiloj de niaj prauloj. La unuaj primitivaj vojoj aŭ vojetoj de tiam iom post iom evoluis al ŝoseoj, kaj ankaŭ pli novaj vojoj kun prefero estas lokigitaj sur la gruzdorsoj. Tia tre malnova ŝoseo estas tiu, kiu el Västmanland kondukas al Hedemora kaj Falun. Je distanco de ĉirkaŭ 70 km ĝi preskaŭ tute estas konstruita sur ruĝstonaj gruzdorsoj. Ankaŭ kiel fervojoj dignoj la gruzdorsoj kelkfoje estas uzitaj. Pli granda utileco ili tamen nuntempe havas pro la bonega vojmaterialo, kion ili liveras.

La ruĝstonaj gruzdorsoj prezentas kiel loĝlokoj multajn avantaĝojn, kaj ili sendube estis gravaj por la plej frua koloniigo en nia lando. Ili konsistigas sekajn, facile ekkultureblan grundon. Kiel kulturkampoj ili verdire malmulte taŭgas, sed la facilaj, sablaj terspecoj, kiuj ofte troviĝas ĉe la flankoj de la gruzdorsoj, prezentis al la antikvaj terkulturistoj facile ekkultureblan plugteron, kiun oni ne bezonis dreni kaj kiu malofte estis elmetita al frostoj. La graveco de la gruzdorsoj por la surkonstruado kaj la historia evoluo de la lando evidentiĝas de tio, ke tiel multaj gravaj urboj kaj grandaj vilaĝoj estas lokigitaj sur aŭ apud la gruzdorsoj, precipe kie ĉi tiuj kruciĝas. Oni ricevas tiun impreson, ke la gruzdorsoj kiel trafikvojoj ludis la saman gravan rolon kiel la grandaj akvofluoj.

Avantaĝo, kiu kredeble frue estis ŝatata, estas la naturaj fontoj, kiuj ĝenerale troviĝas ĉe la gruzdorsoj. Tiuj ordinare enhavas grandegajn kvantojn da akvo, funkciante kiel gigantaj naturaj drenfosoj. La akvo de la gruzdorsaj fontoj estas freŝa kaj pura, kaj la alfluo ofte estas tre abunda. Tiel liveras ekzemple la fonto de Flosta ĉe Altuna en Uppland 9.000 litrojn da akvo pominute, kaj la akvodistribuejo de Uppsala, kiu ĉiujare konsumas proksimume unu milionon da kubaj metroj da akvo, prenas tutan tiun akvokvanton el la gruzdorso de Uppsala.

Ĉi tie ankaŭ estas konvene akcenti la gravecon de la gruzdorsoj por la formigo de niaj loknomoj. Sennombraj lokoj en nia lando pro sia situo apud aŭ sur gruzdorso (= ås) ricevis sian nomon de tiu ĉi. Ekzemploj de tiaj estas: Ås, Åsen, Åshult, Gottåsa, Tåvelås, Torsås. La vorto **malm**, kiu en certa senco signifas sablo aŭ sablotero, ofte estas uzita kiel nomo de gruzdorsoj aŭ dorspartoj kaj el tiu signifo rezultigis loknomoj, ekz.

## La Brita Bank-libertago

La brita "Bank-libertago" leĝiĝis en 1871. Je la unua lundo en Aŭgusto, ĉiujare, la bankoj fermiĝas. El tio venis la nomo "bank-libertago". Ankaŭ fermiĝas fabrikejoj, oficejoj, butikoj ktp. Ĉiuj libertempas kun escepto de tiuj, kiuj laboras je tre necesaj servoj. Je tiu tago la britoj forgesas siajn zorgojn, ĉar ili jam decidigis ĝui sian libertempon.

Du fojojn en la nuna jarcento milito pretiĝis fali sur la kapojn de britoj dum ili tiel libertempis. Sajnas, ke iliaj malamikoj bone elektis la ĝustan tempon por siaj minacoj, sed malgraŭ tio, la britoj ne forlasis sian libertagon!

Je tiu aparta tago okazas granda irado al la marbordaj urboj kaj al la kamparo. La transportproblemo estas grava afero. Je la ĵuspasinta bank-libertago la fervoja aŭtoritatularo plibonigis la servadon per la aldonado de preskaŭ 2.500 ekstraj vagonaroj. Kvin milionoj vojaĝis per vagonaroj kaj per aliaj veturiloj al libertempejoj.

Tiuj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne vojaĝis, invadis la parkojn, riverojn, lagojn kaj aliajn belajn lokojn kaj en kaj ekster siaj propraj urboj. En Londono, dum tiu tago, ĉirkaŭ 20.000 personoj ĉeestis la Zoologiajn Gardenojn. En la marbordaj urboj, la invadintoj estis tiel grandnombraj ke dekoj da miloj el ili devis tranokti ĉe la marbordoj, ĉar ĉiuj loĝejoj estis jam plenplenaĵoj.

La nunan jaron, la semajno antaŭ la bank-libertago komenciĝis kun tropiketa vetero. La varmece estis preskaŭ tro alta, atinginte iufoje pli ol 33 gradojn (centigrado). En la sama semajno komenciĝis la Olimpaj Ludoj en Londono. Eĉ vizitantoj el tropikaj landoj plendis pri la varmece, ĉar la nesekeco de la aero en Britujo pligravigis ĝin. Tamen, malgraŭ tio, iuj olimpaj atletoj superis iujn mondrekordojn.

Allogate per la sunbrila vetero, la britoj komencis sian libertempan "**week-end**" (inkluzive de la lunda bank-libertago). Kio okazis? Tiu lundo veninta, la vetero (en la sudparto de Anglujo, almenaŭ) ŝanĝiĝis. Pluvigis; pluvegis; pluvegadis! En iuj regionoj la temperaturo malaltiĝis 15 gradojn. La marbordoj rapide senvivigis; la parkoj kaj kampoj senhomiĝis. La kinejoj kaj la amuzejoj plenpleniĝis dum la respektivaj administrantoj ridetis kaj felice frotis al si la manojn. Ĉe la stacidomoj la vagonaroj ekpleniĝis por la revenvojaĝoj.

Tamen, la britoj estas filozofaj. Eble la vetero estos pli bona la venontan jaron!

J. Bruno

Malm, Malmköping, Malmslätt, Malmås k. a. Ankaŭ loknomoj kun **mora**, ekz. Mora, Hedemora k. a. verŝajne interrilatas kun tio, ke la loko situas ĉe gruzdorso.

Supre estas iomete menciita la rektan gravecon de la gruzdorsoj por la kulturo. Ankaŭ nerekte ili ludas certan rolon. En pluraj lokoj ili donas al la pejzaĝo specialan aspekton. Multloke en la ruĝstonaj formigoj estas malgrandaj, laŭŝajne sendefluaj, kelkfoje nur periode aperantaj lagoj, kiuj formiĝis per tio, ke pecoj da glacio relative longe restis kaj malhelpis sedimentadon sur la loko. La konata katastrofo, kiam "Vildhussen" en la jaro 1796 malpleniĝis la lagon Ragundasjön en Jämtland, povis okazi, ĉar la lago estis digita nur per ruĝstona gruzdorso.

Ĉi tiu mallonga priskribo kompreneble ne povas esti kompleta raporto pri la svedaj ruĝstonaj gruzdorsoj kaj ilia graveco. Sed la dirita eble iomete montras, kiel la gruzdorsoj formiĝis kaj ke ili ludis certan rolon por la kultura evoluado de Svedlando.

Malte Markheden

## Rompita izoleco

Nia energia samideano Lennart Aberg ĉiam estas tiom plena de bonaj ideoj por propagando kaj laboro en la movado, ke ni faris intervjuon kun li pri la eblecoj por izolaj esperantistoj, partopreni la laboron. Komprenible s-ro Aberg tuj havis proponon, kiel tiuj esperantistoj povas partopreni la utilan laboron. Jen la intervjuo:

— Ofte oni aŭdas plendojn, pli aŭ malpli pravajn. Precipe la izolaj esperantistoj, kiuj vivas en lokoj senklubaj, plendas pro la premanta izoleco. Ili ne havas okazon aŭdi la lingvon, t. e. ili ne alkitimigas je la parola lingvo. Ĉu vi povas proponi rimedon vere efikan por solvi tiun problemon?

— Jes, laŭ mia ĉiutaga konstato tiu problemoj jam estas tute kontentige solvita. Ni ja havas radion! Ĉiun tagon la radiostacioj disaŭdigas programojn en Esperanto. Ĉie en nia lando la programoj estas bone aŭdeblaj. Tion pravas la respondoj al la aŭskultantoj en la "Leterkestoj" de la koncernaĵoj stacioj. De Skanio ĝis Laponoj oni skribas, dankante kaj gratulante. Tamen devus esti multe pli da svedaj skribintoj.

— Sed, ĉu vi estas certa, ke ĉiu esperantisto posedas aparaton? Kaj estas ankaŭ demando pri aparata kvalito, oportunaĵ sendotempoj por la aŭskultantoj ktp. Diru vian opinion!

— Nu, mi konfesas, por komence respondi al la unua demando, ke ne ĉiu sveda familio posedas radion. Sed la malhavo nur en ekstremaj okazoj estas kaŭzita de malriĉeco. Pli terura estas la fakto, kiu estas konstat-ebla precipe en la grandaj urboj, ke la familianoj ne havas "tempon" interesiĝi pri radio kaj eluzi la eblecon riĉigi siajn animojn. Ne ĉiuj programoj estas bonkvalitaj — cetera la gusto estas sufiĉe diferenca — sed oni ja povas laŭ propra gusto elekti sian programon, ĉu ne? Tio signifas, ke oni devas fariĝi aktiva aŭskultanto, ne nur aŭdanto, alproprigante la verajn trezorarojn de la programoj. Sendube la esperantistoj, kiuj pro favora destino de la sorto dank' al nia lingvo konstante edukigas por kultura mondĉivitaneco, jam apartenas al la aktivaj aŭskultantoj, ĉiam saĝe kritikantaj la prezentadojn de la radiostacioj.

— Via demando pri la teknikaj flankoj de la afero estas sufiĉe atentinda. Do, ne ĉiuj aparatoj estas ekipitaj por ricevo de mallongondaj programoj. Kiam temas pri novaj apartoj, oni preskaŭ centprocente havas tiun eblecon. Nuntempe la mallongaj ondoj estas tiom vaste uzataj, ke oni fakte ne povas malhavi tiun arangan por sia ricevilo. Pri la oportuneco rilate al sendotempoj estas tre malfacile juĝi, sed je diversaj

horoj posttagmeze kaj vespere, eĉ nokte, oni povas aŭskulti programojn en Esperanto.

— Sed diru al mi, kial la esperantistoj ankoraŭ ne eluzas la eblecon rompi la izolecon kaj ĉiutage aŭskulti esperantan parolon?

— Tute simpla afero. Multaj ne atendas la eblecojn, aliaj nur malofte venkas sian propran inertecon. Se vi permesas, mi donas praktikan konsilon, nome: eltondu la esperantan radioprogramon, kiun oni trovas ĉiumonate en LA ESPERO kaj en aliaj organoj esperantistaj, kaj fiksu ĝin apud via ricevilo. Kiam vi havas okazon aŭskulti, vi rapide trovas la programon.

— Kion vi mem aŭskultas? Ĉu vi estas kontenta?

— Mi estas tre kontenta. Fakte ni esperantistoj estas vere dorlotitaj, kiam temas pri programoj. Tion mi diras, kvankam mi bone scias, ke la sveda radio nur unufoje monate (provizore) elsendas per mallongaj ondoj 27,83 m. (Ankaŭ tiujn novaĵojn pri la kongreso en Malmö oni povas kontentige ricevi diversloke en la lando, tamen ne ĉie pro teknikaj kaŭzoj.) Sed ĉiutage mi aŭskultas la programojn de Praha kaj Parizo. Praha-stacio, kies aktiveco por kaj per esperanto estas tre laŭdinda, sendas ja dufoje en ĉiu tago. Krome okazas per aliaj ondoj (mezaj) dissendoj lunde kaj jaŭde de la ĉeĥoslovaka radio. Ĉiun unuan lundon de la monato Praha prezentas la majstre belajn kaj ĉiam altkvalitajn programojn de VERDA STACIO. La Parizaj programoj, en kiuj kunlaboras tre eminentaj francaj esperantistoj, estas tre interesaj. Sed, mi ne povas nomi ĉiujn. Laŭ la komunikado en la esperantista radio mi sekvas diversajn staciojn: Budapeŝto, Vieno, Sofia, Ostrava, Warszawa, Bern kaj Romo. Preskaŭ ĉiam la aŭdebleco estas tre kontentiga, kvankam mia aparato estas tute ordinara kaj ne tre multekosta.

— Fakte la izoleco estas rompita. Ĉiu esperantisto povas ĝui esperantajn programojn ĉiutage. Jes, estas tiom da programoj, ke oni eĉ kritikeme povas elekti — tute same kiel rilate al la naciaj programoj.

— Ĉu vi ankoraŭ volas aldoni ion?

— Nur unu gravan alvokon: Skribu kaj skribigu! La radiostacioj estas al vi tre dankaj, eĉ tre komplezemaĵ, se vi raportas al ili pri viaj deziroj kaj spertoj de la programoj. Respondon vi ricevos eĉ en la programoj mem.

Konklude: Ni eluzu la radion kaj — la izoleco estas jam rompita.

### Ricevitaj tondajoj. Oktobro.

9. Folkskoll. Tidn. 19. Svenska Dagbl. 22. VK? 27. Skaraborgs-Tidn. Krome: Annonssjournalen nro 8, ABF Tidning hösten 1948, Cosmos sept. 48.

Ĉu vi zorgis pri tio, ke la listo estas kompleta? Ĉion sendu al Redakcio de Svenska Esperanto-Tidningen, Skonertgatan 1, Göteborg V. Ni plusendas al Pressinformation.

## Pardonu?

Tiu ĉi numero de la gazeto suferas de pli multe da riproĉindaĵoj ol kutime, ni pensas.

La lingvo de unu el la "esperantoj" artikoloj ja estas pli sveda ol esperanta. Neatento kaŭzis tion, kaj ni esperas, estonte povi eviti similan aferon.

La ordo de la artikoloj kaj la metado sur la diversaj flankoj estis en la last-lasto momento rompita, kaj ni ne volis malfruigi la gazeton, sed ĝin tralasas.

Ni per tiuj ĉi vortoj deziras klarigi la aferon kaj esperas pri la indulgo de niaj legantoj.



— Mi mem prenos tiun ĉi diktaĵon de mia edzo, kara fraŭlino Hansson!

## Malbela memoro el Malmö

Ĉu oni vere povas havi malbelan memoron el Malmö kaj la bela kongreso, certe iu demandas. Jes, sed pri tio kulpas ne la aranĝintoj de la kongreso sed ni partoprenantoj mem. Ofte, ofte mi aŭdis la vortojn "italiano, svedano, norvegano, ktp" (Ĉu oni diras ankaŭ "danano"??)

Studante lingvon — Esperanton same kiel kiun ajn lingvon — ĉiam, kiam oni unufoje renkontas iun vorton, oni nepre devas lerni la signifon de tiu vorto. Oni devas ekz. lerni la signifon de "razi", por ke oni ne parolu pri domo "razita" (raserat), kiam ĝi estas ĉe-truita. Ĉu vere estas tiel malfacile lerni ke italo, svedo, norvego k. a. estas nomoj de homoj, kiuj loĝas en resp. Italujo, Svedujo, Norvegujo, kaj ke Alĝerio, Peruo, Usono k. a. estas landoj, en kiuj loĝas alĝerianoj, peruanoj, usonanoj ktp? Ĉu vere tion estas pli malfacile lerni ol ekz. la signifon de "kolbas" kaj "klopod", ke oni ilin ne intermiksi?

Oni ne krii pri logiko. La reguloj por formado de landnomoj kaj loĝantoj ne estas mallogikaj. Eble oni povus diri, ke la uzado ne estas konsekvenca, sed tio — miaopinie — ne estas riproĉinda. Komparu paralelan ekzemplon koncerne nomojn de iloj. Oni devas lerni la signifon de la radikoj broso, komb, martel, hak, hok, kroĉ k. a., kaj oni ricevas vortparojn: broso kaj kombilo, martelo kaj hakiilo, hoko kaj kroĉilo. Sajnas al mi, ke ni estu dankaj pro tiu nekonsekvenceco, kiu liberigas nin de teda unutoneco. — Sed ni lernu la signifon de la vortoj, se ne, ni ne povas apliki la gramatikajn kaj derivajn regulojn ĝuste.

Birger Gerdman.

## Totebo Esperanto Societo

Ni ĉiuj scias, ke genitiven en Esperanto oni esprimas per la prepozicio de. En la sveda lingvo ni ja uzas la finaĵon -s. Tio necesigas inversigon de la vortordo: en la sveda la posedanto antaŭas la posedaton, en Esperanto la posedato antaŭas la posedanton. Nenion malbonan pri Totebo, sed ĝi estas bona ekzemplo pri fenomeno en la sveda lingvo, kiun svedoj ofte emas enkonduki ankaŭ en Esperanton. Nome ĉe propraj nomoj, precipe se ili finiĝas per vokalo, ni ofte forlasas la finaĵon -s. Komparu: Stockholms Stadsbibliotek — Malmö Stadsbibliotek, Göteborgs Sparbank — Örebro Sparbank, Lunds Universitet — Uppsala Universitet, Brunnsviks Folkhögskola — Hardanger Folkhögskola. Estas ja evidente ke ĉiuj ok propraj nomoj havas genitivan funkcion, kvankam nur kvar havas la finaĵon -s. En Esperanto ni do ne perdu la prepozicion de, sed diru: La Urba Biblioteko de Malmö (tute kiel: La Urba Biblioteko de Stockholm), La Sparbanko de Örebro, La Universitato de Uppsala, La Popolaltlernejo de Hardanger. Simile oni ne povas diri "la Esperanto kongreso" sed devas diri "la kongreso de Esperanto". Tamen oni ja povas kunsribi la vortojn kun aŭ sen lig-streketo: Esperanto-kongreso aŭ Esperantokongreso. Komparu: Universala Esperanto-Asocio (notu la streketon!) kaj la 33:a Universala Kongreso de Esperanto (notu la prepozicion!). Ofte la prepozicia konstruo estas preferinda ĉar pli klara kaj pli malpeza ol longa vortkomplekso.

La nomon Totebo Esperanto Societo (ĉu vi rekonas en ĝi la nomon de via propra societo?) ni do devas ŝanĝi je: La Esperanto-Societo de Totebo, aŭ: La Societo Esperantista de Totebo.

La lasta ekzemplo prezentas al ni alian solvon, nome oni povas anstataŭigi la prepozician genitiven per adjektivo. Ekz. la lingvo de Zamenhof aŭ la Zamenhova lingvo, la komuno de Parizo aŭ la Pariza komuno. Ambaŭ esprimmanieroj estas el praktika vidpunkto egal-signifaj. "La prelegista hundo" (= la hundo de la prelegisto) ja estas gramatike ĝusta, sed "la preleganta hundo" (= la hundo de la preleganto) estas absolute nebla. Tamen ĉi tiu esprimmaniero (adjektivigo de la propra nomo) estas uzbla aŭ devus esti uzata nur ĉe

Ernst  
Olsson



Dro Ernst Olsson mortis la 8-an de novembro 1948.

Antaŭ dek jaroj li konatiĝis inter la esperantistoj pro tio, ke li faris resumon de sia disertacio en esperanto. Li doktoriĝis per siaj studoj de "The band spectra of sulphur, selenium and tellurium". Ampleksajn studojn li entreprenis i. a. en Anglujo, Ruslando, Francujo kaj Nederlando.

Dum la lastaj jaroj li verkadis originalan kolekton de biografioj pri svedaj pioniroj en scienco, tekniko kaj kulturo. Estis la espero, ke tiu manuskripto estus povinta aperi kiel jubilea libro ĉe Eldona Societo Esperanto, sed pro malsaniĝo la verkinto ne havis eblecon pretigi ĝin. La eldonejo tamen promesis provi plej baldaŭ plenumi la deziron de la aŭtoro.

Ĉe lia tomo parolis s-ro Teodor Julin en la nomo de la esperantistoj transdonante florkronon kiel lastan saluton de Eldona Societo Esperanto. S-ro Julin esprimis ĉies sentojn per jenaj vortoj:

"Certe decus, ke antaŭ via tomo ankaŭ sonu la esperanta lingvo. Multajn fremdajn lingvojn vi uzis en via laboro, kiu gvidis vin tiel vasten en la mondo. Pro ilia helpo vi ŝatis ilin, la disvastigitan anglan, la klaran francan kaj precipe — oni tion diris al mi — la finnan kaj rusan lingvojn.

Vi ŝatis ilin, sed esperanton, kiu ankaŭ helpis vin en via laboro, esperanton vi amis... Vi amis ĝin, ĉar ĝi kantis por vi pri la konkorda estonteco, al kiu via tuta vivlaboro kiel sciencisto kaj instruisto estis konsekrita. Vi uzis esperanton en via laboro montrante ties valoron kaj faris ĝin konata en tre gravaj medioj.

Via lasta laboro estis esprimo de estimo al tiuj svedoj, kiuj pionire agadis por la prospero de la kulturo, tekniko kaj scienco. Vi verkis iliajn biografiojn en esperanto, ĉar vi estis konvinkita ke vi tiel plej bone servis vian landon kaj celon. La verkajo estis preskaŭ preta kiam la kraĵono falis el via mano. Estu nun la fiera tasko de la svedaj esperantistoj eldoni vian verkon kaj diskonigi ĝin tutmonde laŭ via celo. Tio helpos nin fari niajn svedajn pionirojn ankoraŭ pli konataj al la nuna generacio. Ĝi ankaŭ restos kiel memorŝtono pri vi mem... Esprimu niaj floroj tion, por kio ni ne povas trovi sufiĉe belajn vortojn..."

nomoj asimilitaj, t. e. nomoj kiuj ricevis propran Esperantan formon, ekz. Parizo, Londono, Kopenhago, Gotenburgo k. a., sed ĉe nomoj neasimilitaj la adjektivigo faras ĝenan impreson (por uzi mildan esprimon). La Bournemouth-a Belulino, La Kiaby-a preĝejo, la Bråtensby-a kaj Landa-a komunumo, harstarigaj, ĉu ne? Krome ĝis nun mi ne vidis libron, en kiu oni konsekvence uzas streketon aŭ apostrofon aŭ dupunkton aŭ nenion inter la nomo kaj la a-finaĵo.

Bigo.

## Ester Fernström †

La esperanta movado la unuan de novembro perdis bonan amikino, ĉar tiam mortis s-ino Ester Fernström, edzino de Fred. E. Fernström, Hälsingborg.

Bonkora, gajhumora kaj gastama, ŝi estis unu el la plej bonaj reprezentantoj de "Amikaro de Esperanto", kaj multajn eksterlandajn samideanojn ŝi dum la pasintaj jaroj havis kiel gastojn en sia bona hejmo.

La entombigo okazis la 7-an de novembro. Ĉe la ĉerko parolis inter multaj aliaj ankaŭ la kluba prezidanto Enoch Nilsson, en la nomo de la loka esperanto-societo. Anstataŭ florojn s-ino Fernström deziris, ke oni donu monon al la sveda esperantomovado, kaj multaj geamikoj tiamaniere honoris la memoron de la mortinto, ĉar ŝi dum multaj jaroj laŭ sia eblo multe servis nian movadon.

Niajn sincerajn kondoleancojn al la funebranta edzo.  
**Prez.**

Anstataŭ florojn sendis monon pro la morto de Ester Fernström la jenaj personoj:

Fr. Ester Andersson, Planteringsvägen 146, Hälsingborg .....	10:—
Fru Ester Sköld, Box 534, Ånge .....	5:—
Fr. G. Jonasson, Hemgården, Prästgat. 16, Hälsingborg .....	5:—
Fru Landelius, Flemminggat. 4, Hälsingborg ..	2:—
Herr o. Fru Lindblad, Wrangelsgatan 15, Hälsingborg .....	10:—
Fam. Henricson, Karl X Gustavsgat. 26, Hälsingborg .....	20:—
Fam. O. Bergström, Varbergsgatan 6, Hälsingborg .....	15:—
Hildur o. Börje, Varbergsgat. 6, Hälsingborg	10:—
Karin o. Kalle, Varbergsgat. 6, Hälsingborg ..	10:—
Ruth Perssons Vårdaanst. Nyhem .....	5:—
Fr. Ida Persson, Rosenlund, Mörarp .....	5:—
Hr. Arne Persson o. kusiner, Faktorsgat. 12, Hälsingborg .....	15:—
Ossian o. Amy Nilsson, Furutorpsgat. 57, Hälsingborg .....	10:—
Fam. Axel Ahlqvist, Skånes Vårsjö .....	25:—
Syföreningen, adr. Elsa Lemke, Kaliforniersgat. 1, Hälsingborg .....	30:—
Hr. Einar Lemke, Kaliforniersgat. 1, Hälsingb.	5:—
Hr. Gustav Bergström, Grännagat. 9, Hälsingb.	10:—
Fru Sigrd Sjövall, Aftonklubben, Karlsгат. 7, Hälsingborg .....	5:—
Fru Maria Jönsson, Aftonklubben .....	1:50
Elsa Borg, Aftonklubben .....	2:—
E. J. A. A.—A. N., Aftonklubben .....	3:—
Hildur Rosenqvist, Aftonklubben .....	1:—
Olga Svensson, Aftonklubben .....	1:—
A. Ottergren, Aftonklubben .....	1:—
A. Persson, Aftonklubben .....	1:—
Sigrd Larsson, Aftonklubben .....	1:—
Willy Johansson, Aftonklubben .....	1:—
Ella Persson, Aftonklubben .....	1:—
Greta Jönsson, Aftonklubben .....	1:—
Eva o. Ernst Nilsson, Traktörsg. 10, Hälsingb.	10:—
Fam. S. Magnusson, Hudiksvallsg. 15, Hälsingb.	5:—
Esp.-klubben "La Espero", Bergaliden 3, Hälsingborg .....	25:—
Barbro o. Lennart Hurtig, Flemminggat. 4, Hälsingborg .....	10:—
Fru Ann o. Elin, Skördevägen 24, Göteborg ..	15:—
Gerda o. Karl Ekman, Dämmevägen 17, Göteborg ..	5:—
Fru Elvira Swansson, Götgatan 6, Karlstad ..	5:—
Lektor o. Fru V. Bergström, Hospitalsgränd 3, Linköping .....	5:—
Herr o. Fru Otto Bergström, Allerum .....	5:—
Herr o. Fru Edvin Bergström, Allerum .....	5:—
Herr o. Fru Sixten Jönsson, Platonsv. 4, Bjuv Mälaren Gottfrid Karlsson, Växtorp .....	5:—
Herr Anton Karlsson, Dönarehuset, Växtorp ..	5:—
Nära anhörig .....	10:—

Summa Kr. 326:—

## NI RECENZAS

**Instrua filmstrio senkoste.**

Novzelando eldonis 35-mman filmstriojn kun esperanta teksto, kaj ankaŭ belegajn fotografaĵojn, kiuj taŭgas por reproduktado en landaj gazetoj, ne necese esperantaj. La estonta intereso de la registaro tamen dependas de la rezulto de ĉi tiu eksperimento. Tial samideanoj el ĉiuj landoj bonvolu skribi esperantlingve, petante la fotografaĵojn, kaj organizoj, kiuj havas taŭgan aparton, petu la filmstriojn. Ĉio estas senpaga! Petu de N. Z. Dept. of Tourist and Health Resorts, Wellington, Novzelando. Reciproke, presraportojn, pri elmontraj de la fotografaĵoj aŭ paroladoj kun la filmstrioj oni nepre sendu al la sama adreso. (Nepre skribu afere, letere, por ne malkreditigi nian movadon per infanecaj skribaĵoj).

(Laŭ Esperanto.)

**Esperanta Poŝkalendario**

aperis en Ĉeĥoslovakio. La libro ŝajnas utila. Tamen plej konvenas por ĉeĥoj.

**Karl Lindkvist: Ferio kun la morto.** Originalo. 72 p. Eld. Dansk Esperanto-Forlag. Vendas Förlagsföreningen Esperanto. Prezo: ?? kr.

Ŝajne pri tiu libro temis, kiam la svedaj gazetoj skribis, ke aperos la unua libro en esperanto. Ni tiam esprimis nian esperon, ke ĝi estos leginda. Ni ne trompigis. Por amantoj de kriminalromanoj tiu libro verŝajne estas kontentiga. La plekto de la okazado eventuale povus esti pli implika, sed kio mankas en tiu eco estas anstataŭata per agrabla lingvo. Pri la enhavo ni kompreneble nenion malkaŝas. La manuskripto estas kontrolita de la Literatura Komitato.

Adil.

**Konstitucio ĉeĥoslovaka.**

Interesa libreto aperis: traduko de la nova ĉeĥoslovaka konstitucio. Oni havu kiun ajn opinion pri la popoldemokratataj ŝtatoj kaj ilia sistemo, ĉiuokaze estas interese legi la "originalan" tekston en nia lingvo. Recenzon ni ne povas doni, sed verŝajne la libro estas senkoste havebla de Instituto de Esperanto-Servo, Praha, Ĉeĥoslovakio.



Ni havas certan kvanton da internaciaj respondkuponoj, kiujn ni povas vendi je la favora prezo de 35 ore por peco. Vin turnu al Förlagsföreningen Esperanto, Fack 19071, Stockholm 19.



**Klavarskribo.**

En miaj manoj venis "klavarskribo", t. e. alia sistemo por skribi muzikajojn, ol tiu, kiun oni nun ĝenerale uzas. La "invent"-into aŭ kompilinto de tiu ĉi sistemo kredas, ke ĝi estas pli facile lernebla kaj pli facile legebla ol la ordinara notskribo. Mi montris la aivenintan "Konciza kompendio por ludi la klavaron per Klavarskribo" — kiel tekstas la titolo de la "lernilo" de la Klavarskribo — al kantupertulo. Li ne volis juĝi pri la nova sistemo, sed havis la impreson, ke ĝi estas "ne-kutima". Certe ĝi estas nekutima. Sed kompreneble ĝi ne estas kondamninda nur pro tio. Tion ni esperantistoj tre bone scias. Mi devas konfesi, ke al tia muzika analfabeto kia la subskribinto la sistemo ŝajnas provinda. Mi pensas, ke por netalentaj muzikamantoj la Klavarskribo prezentas faciligon en la lernado, trakti pianon aŭ harmoniumon. La aldonita katalogo pri muzikajoj en Klavarskribo estas iom ampleksa. **Aĉetebla ĉe Förlagsföreningen Esperanto. Kr. 2: 25.**

Adil.

**FAKTOJ PRI DANLANDO**

estas eldonita de la eldonejo de la granda dana tagjurnalo "Politiken" kunlaboro kun Libro-Servo de CDEL, Redaktoroj Helge Larsen, Eo Bransen kaj Finn Rosetzsky. Tradukita de Poul Thorsen kaj H. V. Rasmussen. Formato 12×16½ cm. 64 paĝoj kun teksto kaj ilustraĵoj (fotoj, desegnoj, geografiaj kartoj kaj pikto-gramoj) + 4 paĝoj kun koloraj ilustraĵoj. Kartonita. Prezo en Danlando 2.50 dkr., en eksterlando 3.00 dkr. Havebla ĉe Libro-Servo de CDEL pere de la diverslandaj Esperanto-librejoj.

Kiel informas la libreto, ĝi estas ero de la serio HVEM-HVAD-HVOR (KIU-KIO-KIE), kaj ni deziras ĉi tie aldoni kelkajn pliajn informojn pri ĝi.

Antaŭ 15 jaroj la eldonejo de "Politiken" aperigis HVEM-HVAD-HVOR 1934, libro enhavanta abundon da informoj pri plej diversaj aferoj. Ĝi evidente kontentigis fortan bezonon. Ĉiuj 30.000 ekzempleroj elĉerpigis, kaj same okazas nun en ĉiu jaro, kvankam oni daŭre pli-grandigas la eldonkvanton. HVEM-HVAD-HVOR 1948, la 15-a eldono, estas elsendita en 140.000 ekzempleroj, kolosa eldonkvanto en lando kun nur 4 milionoj da loĝantoj. Tiu grandega sukceso estas komprenebla, ĉar se oni havas kolekton da HVEM-HVAD-HVOR por kelkaj jaroj, oni malfacile trovas demandojn, kiu ne estas respondebla per tiuj libroj.

Tial estas nature, ke la libro estas transplantita al aliaj landoj: Nederlando, VIE-VAT-VAAR (ĝis nun la eldonoj). Norvegio, HVEM-HVA-HVOR (8 eld.), Svislando, WER-WIE-WAS-WO (5 eld.), Svedujo, NÄR-VAR-HUR (4 eld.) kaj Islando, HVAR-HVER-HVAD (2 eld.).

La eldonejo de "Politiken" eldonis ankaŭ aliajn popularajn kaj utilajn librojn: pri literaturo, juro, fremdlingvaj legolibroj, bildvortaro kaj en 1946 MIN HOBBY-BOG, libro pri hobiaĵoj. Ĝi enhavas ankaŭ informojn pri Esperanto, kaj en la okazo de la apero de la libro aranĝita konkurso pri artikolo pri hobiaĵoj gajnis la ĉefpremiojn Poul Thorsen, kiu skribis pri Esperanto.

En 1946 oni aperigis la anglalingvan FACTS about DENMARK enhavantan ekstrakton de la informoj pri Danlando en HVEM-HVAD-HVOR. La libreto aperis denove en 1947 kaj printempe 1948, ĉifoje akompanata de franca kaj hispana eldonoj. Nun, kelkajn monatojn poste, aperas do la Esperanta eldono, FAKTOJ PRI DANLANDO.

Ni kompreneble tre ĝojas, ĉar la bonfama eldonejo de "Politiken" akceptis nian proponon eldoni la libreton en Esperanto. Ni esperas, ke la libro same kiel la aliaj eldonaĵoj de la eldonejo baldaŭ elĉerpigiu, kaj ke ĝi iniciatu similajn libretojn el aliaj landoj kaj internacian KIU-KIO-KIE.

Samideane via

Libro-Servo de Centra Dana Esperantista Ligo.

**Malgranda Revuo**

obstinas. Malgraŭ malfacilaĵoj ĝi aperas fojon post fojo. Ĉiu numero enhavas legindajn artikolojn. La tria numero por 1948 aperis, kaj ĝi sekvas la regulon de la antaŭaj. Plej interesa eble estas la artikolo pri la polinezianoj.

**La dua parto de la jarlibro.**

La dua parto de la jarlibro aperis. Ĝi ĉi tiun fojon ne enhavas, kiel kutime, iun vortaron fakan. Anstataŭe ĝi entenas la statutojn de UEA, la Ĝeneralan regularon de UEA, la Kongresan regularon de UEA kaj fine la novan statutojn por la Akademio de Esperanto. Ĉiuj ĉi tiuj regularoj ja nepre devas esti alireblaj por la esperantistoj, kaj tial oni bonvenigas la publikigon.

VÄGVISARE TILL VÄRLDSSPRÅKET, verkinto ne indikita, kaj Mary kaj Sulo, koresponda rakonteto, verkita de Kamemor, Förlagsföreningen Esperanto u. p. a. Prezo por ambaŭ + la ŝlosilo: 1 kr.

Vägvisare till världsspråket — jen bonega propagandilo-lernolibro, tre taŭga por enmanigi al tiu, kiu deziras informon kaj inicon pri la lingvo internacia — Esperanto. Se tiu vorto ne sonus tiel malbele en niaj oreloj, oni emus nomi ĉi tiun verketon "basic Esperanto". Ĝi estas per la vortoj de l' aŭtoro "la kerno de Esperanto", t. e. 500 vortoj grupigitaj en 22 kategoriojn, "kiuj en via mano kreskas ĝis 10.000", t. e. per helpo de afiksoj, kunmetoj ktp. Krome estas kelkpaĝa gramatiko. Oni povus ankoraŭ deziri nur ke la prononco estu iom pli detale traktita. Sola kritikindaĵo, ke oni lokis la vortojn ial, iam, ie, iel, iom sub "pronomojn". Ili estas adverboj. Male: ambaŭ, kelka, lasta, multa staras sub "numeraloj" kaj sama sub "helpaj vortoj". Ili ja estas pli parencaj al pronomoj laŭ tradicia koncepto.

Bonega komplemento de ĉi tiu lernilo estas la legolibro Mary kaj Sulo, kolekto da leteroj inter angla junulo kaj finna junulino. Laŭ enhavo ŝufice (som inte betyder ganska) interesa kaj kun lingvo simpla, modela. Oni volus kritiki nur la uzon de la nomo Mary, kiu enhavas la neesperantan literon y. Ja ekzistas aliaj karakterizaj nomoj anglaj.

La tri libretoj, kiujn oni ricevas por 1: — kr., estas uzataj en la ĉi-aŭtune komencita "reklam-kampanjo" por Esperanto. Bonan sukceson! **Birger Gerdman.**

A. B. C. d'ESPERANTO à l'usage de ceux qui aiment les lettres, de G. Waringhien, membro de l'Académie de Esperanto. Eldonis Internacia Esperantiste de France, Paris. Havebla ĉe Förlagsföreningen Esperanto u. p. a. Prezo: 1: 25 kr.

Jen alia "vojontrilo" al la lingvo internacia — por francoj aŭ aliaj, kiuj komprenas la francan lingvon. Ĝi estas ĉefparte verkita en kaptiteco dum la lasta milito kaj unuavice intencita por la kamaradoj de l'aŭtoro en la kaptitejo. Ĉar ĝi sin turnas al personoj kleraj, konantaj jam unu aŭ plurajn fremdajn lingvojn, ĝi diferencas de la ordinaraĵ lernolibroj per tio ke ĝi ne estas aranĝita laŭ kutimaj metodoj kaj prezentanta la elementojn de la lingvo laŭ grado de malfacileco. La aŭtoro unue donas tiujn faktorojn, kiuj devas esti esencaj por lingvo internacia: simpleco, reguleco, klareco kaj stabileco, kaj montras kiel Esperanto respondas kaj plenumas tiujn postulojn. Poste sekvas detalaj gramatikaj informoj pri la lingvo kun komparoj al ĉefe la franca sed ankaŭ al aliaj naciaj lingvoj. Frazoj el Proverbaro de Esperanto ekzemplas la diversajn lingvajn fenomenojn. La aŭtoro ankaŭ provis etimologie klarigi la apartajn elementojn, t. e. gramatikaj finaĵoj, eĉ vortaraj radikoj. Li imagis sin en la pozicio de Zamenhof, kiam ĉi tiu devis fari decidojn por kaj kontraŭ la adopto en la lingvon de iu aŭ alia vorto, afikso aŭ finaĵo, pesante kaj konsiderante ilian taŭgecon el diversaj vidpunktoj. Persone mi ne povas eviti la impreson, ke kelkaj (malmultaj) klarigoj estas iomet arbitraj kaj ne absolute konformaj al la realo, sed estas treege malfacile kun certeco decidi tion, precipe ĉar preskaŭ tute mankas informoj de Zamenhof mem pri tiuj aferoj. Ĉi tio tamen neniel ŝanĝas tiun fakton, ke la libro donas treege valorajn kaj utilajn sciigojn ne nur al tiu, kiu bezonas doni informojn pri Esperanto al ne-esperantistoj, sed ankaŭ al ĉiu studento kaj instruanto de la lingvo. La altan kvaliton de la verko cetero garantias la nomo de l'aŭtoro. Oni volas bedaŭri nur, ke ĝi ne estas havebla en la sveda kaj en aliaj naciaj lingvoj. Ankaŭ esperantlingva eldono certe estus utila kaj bonega.

Birger Gerdman.

## VALORA REEDONO

Ludoviko Zamenhof: Internacia Lingvo. 48 paĝoj. Eldonis Vilho Setälä. Vendas Förlagsföreningen Esperanto. Prezo 6 kr.

S-ro Setälä entreprenis ion, al kio oni devas deziri plenan sukceson, nome faksimiligi la unuan libron de d-ro Zamenhof: Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj plena larnolibro por rusoj. Eldonita en Varsovio en 1887.

Recenzi tian libron ja ne havas sencon, sed oni vere devas miri, ke la eldonanto ne kuraĝis presi pli ol 250 ekzemplerojn. Verŝajne tiuj finvendigos en tre mallonga tempo, kaj tiuj esperantistoj, kiuj deziras ekzempleron de tiu unika libro devas rapidi, mi supozas. Mi ankaŭ supozas, ke la plakoj de la faksimiligo restas, kaj ke do oni povas relative facile presi novan kvanton, sed mi ne estas tute certa pri tio. La lastaj paĝoj de la libro konsistas el maŝinskribita traduko el la rusa lingvo de la Antaŭparolo. Tiuj paĝoj post la skribado estas sammaniere faksimiligitaj kaj presitaj.

Oni devas esperi, ke tiu provo ne estos la lasta, doni al la nuna generacio de esperantistoj imagon pri la aspekto de la unuaj, nun ne plu aĉeteblaj libroj en esperanto.

Oso.

## Redakcia babilado

Verda idioteco.

Ie ni legis, ke iuj gesamideanoj en Bulgarujo donis al filino sia la nomon Esperantina. Ni trovas tiun novan mondaninon bedaŭrinda. Eĉ la plej fanatika esperantisto ja devas trovi, ke la esperantomovado ĝis nun tute ne venkis definitive. Kaj do la malfeliĉa knabino devos suferi de tia nomo, kiu verŝajne estas ankaŭ en la bulgara lingvo same nekutima, kiel ĝi estus en la sveda. Oni devas esti perdinta gravan parton de sia saĝo, kiam oni lasas amatan filion porti la sekvojn de erarvanta esperantismo. Oni facile povas imagi, ke tia nomo estos por la portantino tiel ĝena, ke ŝi malamos esperanton anstataŭ amos. Ĉu tiuj gepatroj estas "bonan-taĝon-esperantistoj"?

Observoj de Pik.

La Red. ĉiam ĝojas, legante en Flandra Esperantisto la "Observojn" de PIK. Ĉiam temas pri freŝaj vidpunktoj pri esperantistaj problemoj. Kaj mi devas diri, ke mi lin bone komprenas, kiam li deziras, ke ni havu koncentrejojn por certaj "samideanoj", kuj estas pli bonvolaj ol lertaj. "La koncentrejojn ni jam posedas", estas la konstato de PIK. — Sed ĉu frenezulojn oni metu en koncentrejojn?



## ABONNERA

### UTLÄNSKA

#### ESPERANTO-TIDNINGAR 1949

Namn	Nr/År	Kr.
Amerika Esperantisto ..	6	6:—
Belga Esperantisto ....	6	6:50
British Esperantist ....	6	3:—
Dansk Esperantoblad ..	12	4:—
Esperantobladet, Norge	12	3:—
Esp. Finnlando .....	12	5:—
Esp. Slovaka .....	12	5:25
ESPERANTO UEA ...	11	7:—
Flandra Esperantisto ..	12	6:25
Esperantista, Tjeckosl.	10	4:50
Franca Esperantisto ..	9	5:—
HEROLDO .....	ca 20	14:50
Internacia Kulturo ....	?	9:—
Juna Vivo, TJO .....	10	3:50
LIT. MONDO .....	6	11:—
O Brasil Esperantista .	4	4:50
LA PRAKTIKO .....	12	8:25
La Ponto Tyskland ....	12	2:25
Río Esperantista .....	12	7:50
Sennaciulo .....	12	6:—
Svisa Espero .....	?	?
Univ. Poŝtm. Revuo ..	6	3:75

Angivna priser gälla utan förbindelse, enär vi ännu ej hunnit få bekräftelse från samtliga tidningar å prenumerationsavgift för 1949.

Avgiften för Heroldo får delas upp på två inbetalningar: Kr. 9:— senast i januari och resterande kr. 5:50 senast i maj 1949.

Betr. sådana tidningar som ej upptagits här anskaffa vi prisuppgift på begäran.

Prenumerationsavgift insändes snarast till

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO**

POSTGIRO 578 — STOCKHOLM 19

Skriv namn och adress med tryckbokstäver!

## Hur man prenumererar på SVENSKA ESPERANTO TIDNINGEN för 1949

Medlemmar i klubbar anslutna till SEF skall ej prenumerera på tidningen, ty den ingår i medlemsavgiften, vilken inbetalas av klubbkassören till SEF:s postgirokonto 2012 under januari månad. De medlemmar, som ej betalat sin avgift till klubbkassören i januari skall meddela denne om de ha för avsikt att kvarstå under 1949. Detta är viktigt för att kassören skall kunna meddela Förbundet vilka medlemmar, som skola ha tidningen trots att avgiften ej kan insändas förrän senare.

Enskilda medlemmar på ort där SEF-klubbar ej finns, betala sin medlemsavgift, kr. 7:50, vari tidningen ingår, till SEF:s postgirokonto 2012 senast under januari månad.

Esperantister ej anslutna till SEF kunna abonnera på tidningen genom att insända kr. 5:— till SEF:s postgirokonto 2012 (men vi hoppas förstås att Ni lägger till kr. 2:50 och därmed erhåller medlemskap såväl i Svenska Esperanto Förbundet som Universala Esperanto Asocio).

Angiv alltid å postgiorkortets talong vad inbetalningen avser!

Skriv namn och adress med tryckbokstäver!

Betala avgift helst redan nu, så att tidningens upplaga kan bestämmas i förväg!

Prenumeration mottages endast för tiden januari—december.

Prenumeration till utlandet för 1949 kostar kr. 6:—.

## SVEDA ESPERANTO GAZETO LA ESPERO (Svenska Esperanto Tidningen)

Abonprezo por la jaro 1949 estas sv. kr. 6:— (aŭ 20 internaciaj respondkuponoj).

Korespondanconco kostas sv. kr. 1:50 aŭ 5 int. resp. kup.

Kotizo pagebla al la libroservo en via lando.

Eldona Societo Esperanto.

## Svenska Esperanto-Tidning La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund

Redaktör: Oskar Svantesson, Skonertgatar  
Göteborg V. Tel. 29 03 81.

Prenumerationspris. Helt år (12 nr) kr. 5:—. Losnummer: 0.50. Eksterlanda abono kr. 6:— aŭ 20 int. respondkuponoj.

Annonspris: 0:20 pr mm. Korrespondensannons: 1:50 (aŭ 5 int. respondkuponoj).

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a. Postadress: Päck 19071, Stockholm 19. Expedition: Sveavägen 98, VI (9—13.) Telefon: 31 65 01 (förlagschef 50 88 05). Postgiro: 578. (Böcker, tidningar m. m.)

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Medlemsavgifter. Direkt ansluten medlem erlägger kr. 7:50 pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidningen, erlägger kr. 4:— pr år.

Föreningar. Enl. beslut å SEF:s årsmöte 1947 skall kollektiv prenumeration ske från alla föreningar anslutna till SEF. För varje medlem erlägges en avgift av kr. 5:— (familjemedlem kr. 2:—). Medlemsförteckning (vari familjemedlem betecknas med F) insändes av föreningens kassör senast i januari.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO. Cefdelegito redaktoro Einar Adamsson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. Tel. 14 58 40, postgöra konto 443 81. Kotizoj: MJ 4:— kr., MA 10:— kr., MS 20:— kr., kaj Patrono 100 kr.

Esperantistoj en Stockholm aĉetas siajn okulvitrojn plej favore ĉe

## SÖDER-OPTIK

Katarina Bangata 13

(tute apud Södra Varuhuset)

# YTONG

är det idealiska väggmaterialet för bostadshus och industribyggnader. Tack vare den stora isoleringsförmågan ger den fukt fria och sunda bostäder. Undvik trähusets brandrisk och höga underhållskostnader. Bygg i bättre klass genom att använda Ytong.

**Bygg för framtiden ett högisolering stenhus  
till samma eller lägre pris än ett trähus.**

**YXHULTS STENHUGGERI A.B.  
Hällabrottet**



## BOKENS DAG – JULKLAPPAR



### ANTOLOGIER

Belga ..	9:50
Ĉeĥoslovakia	18:50
Hungara	16:—
Sveda	10:—
	8:50
Svisa ..	18:50

### ZAMENHOF- PORTRÄTT

Kr. 1:—

### BORDSSTANDAR

(utan stång)

Vitt siden  
med gulddekor

Kr. 13:—



16 × 24 cm.



### Gösta Berling

Selma Lagerlöfs mästerverk  
Övers. av Stellan Engholm  
Illustr. av Einar Nerman

6:—  
Hft.

7:50  
Inb.



### SILKESSKÖLDEN

Grön, vinröd eller blå.

18 × 20 cm. Kr. 4:50

28 × 30 cm. Kr. 5:95



Presentkort å  
prenumeration Kr. 14:50

5 STELO-LIBROJ Kr. 25:—  
Vol. I-V

(Endast ett fåtal kompletta serier återstå)

### SILHUETT- TAVLOR

Storlek  
25 × 32 cm.

Olika natur-  
och barnmotiv.

Pr st. 2:—



### JULPAKET Kr. 2:—

10 esperanto-julgransflaggor  
10 jul- och nyårskort med esperantotext.  
(Skriv bara: Julpaket 2:—)

Vid förskottslikvid för order under 10:— tillkommer 10 % för porto.



## Förlagsföreningen ESPERANTO

Fack 19071

Stockholm 19

Postgiro 578